

La Eklezia Revuo

Sendependa, internacia organo de la religio kaj de la literaturo

Organo de la Eklezia Esperantista Ligo



ELDONODATO:

La 15-a de NOVEMBRO 1921

Aldonaĵo kun ĉi tiu numero:

„Titolopaĝo“ kaj *Enhavo* por Vol. 1—3.

Redakcio kaj Administracio:

FARNLEY TYAS VICARAGE,
HUDDERSFIELD, ANGLUJO.


NUMERO 13—14. PREZOJ (afr.):

[4a. VOLUMO. No. 1—2.]

Jarabono, 3 ŝil.
(aŭ 5ŝ. subvencia abono)
Spec. N:o, 5 pencoj.

Duobla numero.

PRO REUNIĜO
ANOJ DE ĈIU KRISTANA
EKLEZIO ALIĜU AL



LA EKLEZIA
ESPERANTISTA LIGO.
Adr.: Farnley Tyas Vicarage,
apud Huddersfield, Anglujo.

REDAKCIAJ KAJ ADMINISTRACIAJ AVIZOJ

Redaktoro kaj Administranto de *La Eklezia Revuo*: lia presbitera moŝto A. J. ASHLEY, paroĥestro de Farnley Tyas, Huddersfield, Anglujo, al kiu oni adresu ĉiun komunikadon rilate la Revuon.

Eldonodato: *La Eklezia Revuo* estas kvaronjara. Pro diversaj kaŭzoj rilate la efikecon de la revuo estas neutile precizigi la eldonodaton; sed ĝenerale oni elsendas ĝin dum la unua duono de ĉiu kvaronjaro.

Enhavotabelon kaj titolopaĝon oni eldonas post eligo de ĉiu dekduo da kajeroj. La Administranto ne eldonas anstataŭbindan kovrilon; sed volas bindigi la Revuon por abonantoj laŭ kondiĉoj speciale aranĝeblaj.

Reklamtarifo: (unufoja enpresio) 1 paĝo, Sm. 15; $\frac{1}{2}$ p., Sm. 8; $\frac{1}{4}$ p., Sm. 4.5; $\frac{1}{8}$ p., Sm. 2.5; 10 vortoj, Sd. 40. Rabato por kvar aŭ plimultaj enpresoj. Petu detalan tarifon. La Redakcio kaj Administracio penas certigi, ke la reklamantoj estas fidindaj sed tute ne akceptas ian respondecon pri reklamoj.

Manuskriptoj, k. t. p.: La Redaktoro zorge konsideros manuskripton alsenditan; sed li ne akceptas ian respondecon pri ĝi, kaj ĝenerale ne resendas neakceptitan manuskripton se oni ne kunsendas adresitan koverton kaj ankaŭ poŝtelspezon. Kunlaborantoj bonvole skribu legeble, preferinde per skribaĵo, kaj nur sur unu flanko de la papero.

Korekto, Represo, k. t. p.: la Redaktoro rezervas al si rajton korekti manuskripton enpresotan en *La Eklezia Revuo*. Sen interkonsento kun la Redaktoro represi aŭ nacilingven traduki artikolon aŭ tradukaĵon, kiu aperas en *La Eklezia Revuo*, estas malpermesate.

Recenzo: la Revuo raportas novajn verkojn, gazetojn, k.t.p., kondiĉe ke la Redaktoro donace ricevu DU EKZEMPLEROJN kaj, ke ili estu sufiĉe gravaj kaj interesaj. Oni interŝanĝas tiun ĉi Revuon kontraŭ alilandaj gazetoj po du ekzempleroj.

Kaŭze de necertaj kondiĉoj de la nuna tempo la Redakcio ne *garantias* publikigon de *La Eklezia Revuo* aŭ al abonantoj aŭ al reklamantoj.

Respondeco. La Redaktoro ne akceptas respondecon pri opinioj esprimataj en artikoloj de *La Eklezia Revuo*.

LA VALUTO

KAJ

E. R. ABONPAGO.

Grava avizo:

De personoj loĝantaj en malbonvalutaj landoj al kiuj abono estas malfacila aŭ neebla pro la valuta Konfuzado la Redaktoro volas kelfoje akcepti librojn aŭ poŝtmarkojn (*sed ne malbonstatajn p. m. nek la pli vulgarajn*) anstataŭ mono; aŭ li proponos specialan portempan rabaton por ebligi disvastigon de la Revuo kaj servi al Esperantistoj en malfeliĉaj vivkondiĉoj.

L'ESPERANTO

Internacia Monata Revuo

sub patronado de Itala Katedro de Esperanto
Eliras en S. Vito al Tagliamento (Italio)

LITERATURA KAJ KORESPONDA
FAKO. LINGVAJ LEKCIONOJ PER ES-
PERANTO. ENIGMOJ. KONKURSOJ

Jarabono Italajn Fr. (Lirojn) 5

Plena Kurso de Itala Lingvo por Espe-
rantistoj

Ital. Fr. (aŭ Lirojn) 6.50

LA EKLEZIA ESPERANTISTA LIGO

HELPAS AL RECIPROKAJ AMI-
KECO KAJ KOMPRENIĜO IN-
TER ĈIUJ KRISTANOJ; KAJ
TIEL FARAS VOJON AL LA
REUNUIĜO DE LA EKLEZIOJ.
ALIĜU por HELPI kaj profiti,

Eksterlanda Kotizaĵo: Ordinara, 3 ŝi-
lingoj; Subvencia, 6 ŝ.;

Enlanda Kotizaĵo: Ord. 3 ŝ.; Sub-
vencia, 5 ŝ.

Hon. Sek.: *Pastro A. J. Ashley,*
The Vicarage,

Farnley Tyas, apud Huddersfield, Anglujo.

AMERIKA ESPERANTISTO

du-lingva organo de la Esp.-Asocio de
N. Ameriko celas antaŭigi

ESPERANTON

inter la plej multenombra parolantaro de la
angla lingvo en la mondo:

Jen nia batakkampo!

1 jaro — \$ 1.00 usona; 20 resp.-kup.

ESPERANTO OFFICE

W. NEWTON, 65, Mass., Usono.

La Eklezia Revuo

Sendependa, internacia organo de la religio kaj de la literaturo.

NUMERO 13—14. VOL. 4, NO. 1—2. ELDONODATO: 15 NOVEMBRO, 1921.

ENHAVO:

Redakciaĵo	1	Leĝkondiĉoj de la Rusa Eklezio	16
Staris la Patrino' (Himno).....	2	La Revivigo de la Hebrea Lingvo (E. B. Jehuda).....	19
Pilgrimado al la Unueco (C. H. Brent)	3	Religiaj Pensoj de J. W. von Goethe	20
La Internacia Societo por la Paco (W. W. Trainer)	6	Antaŭ Sunleviĝo en la Valo de Chamouni (S. T. Coleridge) ..	28
La Eklezia Mondo	8	Tri Lirikoj de William Shakespeare	31
La Principoj kaj Organizado de la Ĉeĥoslovaka Eklezio (K. Farský)	13	Bibliografio.....	33
		Kroniko de E. E. L.	35

REDAKCIAĴO.

Komencante la duan trijaran serion ni ĝentile salutas la legantaron de *La Eklezia Revuo*. La rolo de redaktoro devas esti iom silenta: tial ne ofte ĉi tie troviĝas redakciaĵo; kaj ne difektiĝas ĉi tiuj paĝoj per oftaj »alpetoj», »alvokoj» kaj aliaj samspecaĵoj, kiuj estas efemeraĵoj nekonvenaj al revuo kies ofico estas tiom, kiom eble, pritrakti aferojn daŭre gravajn. Tamen ni nun petas, ke la amikoj de *E. R.* zorge priatentu kelkajn vortojn.

Pri la financa situacio ni nur diras, sen ellaboro de la temo, ke la Revuo nepre bezonas pli da helpo per subvencio de la nuntempaj abonantoj kaj per novaj abonoj; ni povos daŭrigi la eldonadon nur se entuziasma helpo alvenos.

Nia celo ne estas ŝanĝita, t. e., fondi gravan unuaklasan religian organon en kiu verkistoj de ĉiu kristana eklezio povas reprezenti la gravaĵojn de sia eklezio, kredo, k. c. Por tiu alta celo necesa estas kunlaborado de kapablaj eklezianoj el ĉiu nacio. Iomete ni faris por organizi la mondvastan kunlaborantaron; sed, precipe por »La Eklezia Mondo», ni ankoraŭ serĉas fidindajn kaj konstantajn korespondistojn. Legantoj el diversaj landoj kaj eklezioj povas, se ili volas, multe plibonigi la Revuon tiurilate. Ĉu ili proponos nomojn de personoj taŭgaj por reprezenti sian landon aŭ eklezion? Ni invitas artikolojn pri ĉiuspecaj gravaj aferoj de iu eklezio.

Kara al ni estas la literatura fako de *E. R.* en kiu ni celas prezenti iun klasikan aŭ, kelkfoje, originalan verkon en ĉiu kajero. Per tiu fako la Revuo pli kaj pli valoriĝas eĉ al tiuj, kiujn tute ne interesas la ekleziaj aferoj.

La nuntempa *E. R.* estas laŭ nia celo nur ombro antaŭiranta tiun grandan tutmonde ampleksan alcentrigaĵon de la pensoj kaj agadoj de ĉiuj eklezioj, kiun ni celas fondi. Pro tiu granda celo, pro la senpartieco de la Revuo, pro ĝia literatura kaj propaganda valoro ni kredas, ke *La Eklezia Revuo* meritas la subtenadon de ĉiu kristana Esperantisto. Tiun subtenadon ni petas, plene kredante, ke la vortoj ne estos vanaj. Ni penis kaj penos meriti subtenon: jam *E. R.* iras en ĉiun landon: ĉiu nacio pli helpu, uzadu kaj pliriĉigu ĝin. Ni dankas ĉiujn kunlaborantojn kaj subtenantojn, rememorigante ilin, ke per akcelado de la progreso de la internacia lingvo ili servas al la celoj de Dio ĉar per ĝi ĉiujare plifortiĝos la emo al paco kaj vera amikeco ĉe la tuta homaro. — REDAKTORO.

STARIS LA PATRIN'.

Ario: STARAT MATER.

The image shows a musical score for a hymn. It consists of two systems of music, each with a treble and bass clef. The key signature has one flat (B-flat), and the time signature is common time (C). The first system contains the first few measures of the piece. The second system continues the piece and ends with a double bar line and the text "A = men." written below the staff.

El la latina tradukis L. A. LONG.

(Ne estas decidite, kiu verkis tiun ĉi sekvaĵon, aŭ himnon: eble INNOCENT III (1199—1216) aŭ Jacobus de Benedictis (1306), laŭ diversaj opinioj. Kredinde, ĝi apartenas al la 13:a jarcento. La tuta himno ordinare konsistas el dek strofoj, el kiuj la kvin unuaj sekvas).

STARIS la patrín' larmema
 Apud kruco dolorema,
 Dum pendadis ŝia Fil';
 Ŝian koron nun ĝemantan,
 Malĝojeĝan, dolorantan,
 Trapenetris mortigil'.

Kiu homo ne larmadus
 Se li kristpatrinon vidus
 En tioma suferad'?
 Kiu ne malĝoja iĝus
 Pia se patrín' vidigus
 Kun la Fil' en dolorad'?

Ho! malĝoja, afliktita
 Eŝtis la patrín' benita
 De la solegenerit'
 Kiu ploris kaj doloris
 Kaj tremadis dum ŝi vidis
 Punon fama de l'naskit'!

Pro la pek' de lia nento
 Lin ŝi vidis en turmento
 Subigitan per skurĝad';
 Vidis dolĉan la naskiton
 Dum li cedas la spiriton
 Forlasita en mortad'.

Ho, patrino, amofonto,
 Min sentigu dolorforton,
 Ke ploradu mi kun vi;
 Fervorigu koron mian,
 Ke, amante Kriston Dion
 Plaĉon faru mi al li.

PILGRIMADO AL LA UNUECO.

DE LIA EPISKOPA MOŜTO, C. H. BRENT, D. TEOL.

(Episkopo de Okc. *New York*).

Antaŭ dek jaroj malgranda grupo de kristanoj ekprenis sur sin la celon, unue ekimagitan ĉe frumatena eŭkaristio sin kunigi en speciala pilgrimado al unueco en la fendita Eklezio de Jesuo Kristo. Ne estis homfarita projekto, sed humila penado nin akordigi kun la animo de nia Sinjoro esprimita en lia preĝo *he ili ĉiuj estu unu*. El tiu ĉi modesta komenco kreskis mondvasta movado, tiel ke, ĉe la Prepara Kunveno de la Mondkonferenco pri la Fido kaj la Ordo, (kiu okazis en Genève, Svislando, Aŭguston, 1920), okdek eklezioj kaj kvardek nacioj reprezentigis. Tiu ĉi Konferenco signas stacion en nia vojaĝo, kaj esprimas ankaŭ la spiriton de la pilgrimantoj, el kiuj kelkaj, ekzemple la germanoj kaj rumanoj, venis per granda propra kostpago.

Nia vojaĝo estas longa. La kristanoj okupis pli ol mil jarojn por atingi la malproksiman landon de la disiĝo, kie ili nun loĝas. Ni ne

povas rehejmeniri en momento. Kelkaj el la pilgrimantoj, kiuj unue antaŭ jardeko kaptis la vizion, apenaŭ esperis tiom progresi sur la vojo, kiom ili efektive faris, en tia mallonga tempo. Ekzistas la tento, kontentiĝi per malrapida progresado kaj resti kontenta je io pli malgranda ol la celo starigita de Dio — t.e., eklezio, sur la tero, inter la homaro, videble kaj organe unu. Partaj unuiĝoj ŝajnas esti pli eblaj, kaj federaciigo havas allogajn ecojn: sed ili tre maltrafas la hejmon. Plie, neeblaĵoj estas, laŭ la plano de Dio, la sola por homara kapablo sufiĉe alta celo, Ni permesis al ni akcepti kiel fakton la necesecon de kristana disiĝo, blindaj je la fakto, ke la unueco estas la unua kaj ne la lasta bezono por firma piedteno de Dio inter la homaro. La tintaj ambicioj de la disiĝo estas ofendaj al la visaĝo de mondo frakasita kaj konfuzita, kiu serĉas kondukoscion kaj trovas nenion. La elfaro de la eklezioj, unue kaj laste, aparte kaj kune, estas, laŭmezure en iliaj altsonaj deklaroj kaj postuloj, kompatinda. La malsukceso de la kristanismo — kaj ĝi ja malsukcesis — estas la neevitebla malsukceso de regno dividita kontraŭ si mem. Ĝi daŭre malsukcesos ĝis ĝi vidigos unuecon, kaj ĝis, per tio, ĉiuj privilegioj kaj riĉecoj, kiujn ĉiu el ili aparte posedas, estos je ĉies dispono.

La pilgrimantoj ne asertas, ke ilia estas la sola vojaĝmetodo, nome laŭvoje de konferenco pri la fido kaj la ordo; tamen ili ja asertas, ke ilia estas la sola celo, kaj ke la spirito kiu estas ece propra al interkonsiliĝo estas la nepra spirito por pilgrimanto al la unueco — la fila spirito, kiu prenas la dian intencon kiel ĝian propran, kaj la frata spirito, kiu postulas, ke ĉiu kristano estu frato amata. Longan tempon la polemiko furioze flamadis en la eklezioj grandaj kaj malgrandaj, kaj nigrigis kaj bruletigis multajn belaĵojn. Ĝis nun ĝi ne estingiĝis. La polemika spirito ĝojas en dialektika venko — kia sentutila triumfo! — kaj ĝojaĉas kontraŭ venkita malamiko. La spirito de konferenco estas la sklavo de la vero, kaj ploras pro tio, ke abismoj restas netranspontitaj, kaj ke bonuloj estas fremdigitaj unu al alia. La polemiko amas militon, kaj la interkonsiliĝo amas la pacon. La polemiko tre respektas siajn proprajn konvinkigojn, kaj malmulte tiujn de aliuloj. La interkonsiliĝo aplikas »la oran regulon« rilate al la disigitaj kaj postulas reciprokan respekton de unu por la konvinkigoj de alia.

Unu semajnon la pilgrimantoj ĉeestis konferencon en Genevo. Malsimilecojn de penso oni klare skizis kaj ne aperis sur la horizonto iu tuja repaciĝo: tamen oni neniam aŭdis vorton akran aŭ obstinan.

La ĝenerala konvinkigo ĉe la koro de la afero estis, ke malfacilaĵoj kuraĝe elmetitaj kaj malsekrete renkontitaj estis la solaj malfacilaĵoj en la vojo al solvo. Tio, kio aperas kiel kontraŭdiro, havas kiel la sekreto de sia forto riĉecojn de ekzisto kiuj, post kiam ili estos harmoniigitaj kun la tuta plano de Dio, malkaŝigos kiel aldonaj elementoj necesaj al la perfekteco. La studado pri la Eklezio, — kia ĝi estas en la animo de Dio, kion ni intencas per la unueco, pri la devenoj de la inspirado de la Eklezio, pri la plej bona perlingva esprimo de vivanta fido: tiuj ĉi okupis la preĝojn kaj pensojn de la pilgrimantoj dum la Konferenco, kaj okupos ilin longan tempon estontan. La fido unue, poste la ordo. La ena principo de la vivo: jen la idealo; kaj poste la metodo propagandi kaj protekti per organa sinregado tiun enan principon.

La konkurado de eklezioj ricevis gravan baton per la unuigita ago de la pilgrimantoj. Estas peko kontraŭ la amo peni depreni kristanon for de lia propra eklezio por helpi alian eklezion plimulti la nomaron. Ŝafsteladon en la bestkomercmondo oni opinias krimo. Kiel do oni devas ĝin rigardi inter la subsafistoj de la Bona Ŝafisto? Tio estas demando, kiun la pilgrimantoj direktas al ĉiuj eklezioj. Ne estas tiel, kiel se la tuta mondo estus evangeliita aŭ se estus ie manko de oportuno. La nombro de la nekonvertitoj kaj netuŝitoj en preskaŭ ĉiu nomebla komunumo konsistigas la plimulton el tiu komunumo. Unuigita penado rilate tiujn, kiuj ne konas Kriston estas nia elementa devo.

La Spirito de Dio estis la forto de la pilgrimantoj. Li faris nin unu en nia kunuleco. La Konferenco estis viva korpo. Vivo tuŝis vivon, nacio tuŝis nacion, la spirito de la Oriento interkomunikiĝas kun la spirito de la Okcidento laŭ grado kredeble neniam antaŭe spertita. Laŭ invito la lastan tagon de la Konferenco ni kunvenis — estis la Festo de la Aliformiĝo laŭ la Kalendaro Orienta — en la Rusa Ortodoksa Preĝejo en Genevo por la solena adorado de la Dia Liturgio. Anglikanoj, Baptistoj, Malnovaj Katolikoj, Presbiterianoj, Vesleanoj, Luteranoj, Kvakeroj, — ĉiuj kunvenis kaj ĉiuj estis tie por adori. La Metropolito de Seleŭkia parolis en spirita parolado al la pilgrimantoj pri sia propra ĝojo rilate la vizion de unueco kaj pridiris kiel el la aliformigitaj ĉagrenoj kaj doloroj de la estanteco ni levigos al la gloro de la estonteco. Ni okcidentuloj bezonas la bonodorecan, gracian adoradon de la Oriento. La beleco de Dio plenigis la templon. Ni sentis, ke ni estis entiritaj tra la perlaĵ pordoj

de la Apokalipso; kaj ni revenis kun *pain benit* kaj vinberoj en la manoj kaj dolĉeco en la animoj, sub la ĉarmo de la mistika Oriento. Konvene estis, ke ni tuj konsideru kelkajn proponojn prudentajn kaj fortajn de la Ortodoksaj Eklezioj rilate al la kunlaborado kaj la kunuleco. Post malmulte da minutoj la Konferenco fariĝis historia fakto, espero, vizio.

La pilgrimantoj reiris hejmen kun aldonitaj inspiro, konvinkigo, kaj respondeco. Neniu foriris nekortuŝita. Kion alia jardeko naskos en tiu ĉi movado kiu povas diri? Tamen ĝi estas en la mano de Dio de kiu ĝi venis kaj al kiu ĝi apartenas. Ĝi estas nur tiugrade nia, kiel ni rekonas ke ĝi estas lia. Senpere kaj pere ĝi jam malproksimen atingis. Ĝiaj eblecoj estas mezurataj sole laŭ nia voleco ilin esplori. Ili plene realiĝos se ni pilgrimantoj daŭre celos fari nian malgrandan parton same kiel Dio, kies kunlaborantoj ni estas, faras sian grandan parton. Iun tagon estos unu ŝafaro sub unu Ŝafisto. Ni pilgrimantoj registras nian viglan kredon je tiu ĉi fakto, kaj intencas daŭrigi la vojaĝon ĝis ni atingos la ĉielon, kie ni volas esti.

El la angla lingvo tradukis A. L. Curry.

LA INTERNACIA SOCIETO POR LA PACO.

DE W. W. TRAINER.

La Internacia Societo por la Paco estas fondita por disvastigi sciigon pri la pli simplaj kaj facile komprenataj lecionoj en la Biblio, per eduko rilate al la temo inter la plej influaj anaroj de homoj en ĉiuj landoj, nome, la militistoj, la policanoj, kaj la civilaj kaj publikaj servoj.

La societo havas por siaj ĉefaj celoj: antaŭenpuŝi la movadon por la paco sur la tero; la instruo pri deteno de venĝemaj pensoj kaj de ĉia nenecesa perforto; (S. Mat. 5³⁹); la kuraĝigo de industrioj, kiuj permesas pli grandan mezuron da honesteco kaj justeco en la vivoj de ĉiuj; eble ĝardenistoj sin okupas pri la plej grava industrio; la disvastigo de la scio pri la pli feliĉa vivo, kiun oni povas havigi per sindeteno de ebriigaĵoj kaj de aĵoj, kiuj stimulas la organojn kaj sekreciojn de la homa korpo nenaturgrade, kaj tiamaniere devigas nin pensi kaj agi malprave (Rom. 14²¹); kutimigi la uzon por manĝo

de legomoj, lentoj, radikoj kaj aliaj plantaĵoj, kiuj povas esti facile kaj plezure kreskigitaj, rikoltitaj kaj preparitaj; la progresigo de la movado por homa bonkonduito al obeemaj vivantoj.

La unua el tiuj celoj, la paco sur la tero — kiu signifas ne sole la forigon de konkura batalado kaj malbonvolo inter la nacioj, sed ankaŭ la nuligon de la kaŭzo de disputo inter la individuoj de la nacioj — devas pli aŭ malpli frue efektiviĝi iaokaze. Ĉi tio povas komenĉi nun.

La tuta tendenco de la evolucio estas tien, sed konvinki kelkajn kategoriojn de individuoj, ke tio vere estas, estas kelkfoje malfacila tasko. La evolucia intenco de la naturo, kelkaj personoj pensas, estas tiel nesondebla—tiel neesplorebla, kaj la spirito de la malbono kaj la malpaco tiel markita en la homo, ke neniu povas antaŭvidi tempon en kiu pacemo kaj amo unu por la alia estos vere karakterizaj de la homaro. Tamen ŝajnas tute evidente al aliaj, ke la granda trafo ne estas tiel malproksima, kiel tiuj pesimistoj supozas.

Milito okazas inter nacioj sole kiam aroj de la popolo en la lando estas pretaj kaj preparitaj militi kontraŭ la popoloj en aliaj landoj aŭ nacioj.

La disvastigo de edukado, kaj civilizacio ĝenerale, nun atingis tian gradon, ke la demando, »milito aŭ ne milito?«, estas, en la estonteco, grandmezure decidita de la plej inteligentaj anoj de ĉiu komunumo. »Batali aŭ ne batali?« nun fariĝas afero, kiun la individuo povas decidi por mem. Estas pli facile por la individuoj de la nacio vivi pace unu kun la alia, kaj kun la popolo de aliaj nacioj, ol multaj personoj ŝajnas konjekti. La vera funkcio de taŭga pacmovado estas montri, kiamaniere oni povas fari tion, kaj instrui la evangelion de la paco kaj la amo, kiu estas la ĉefa celo de la pacleĝo de nia Savanto. La profeto Jesaja (Jes. 2^a) diras, ke »Li juĝos inter la nacioj kaj admonos multajn popolojn; kaj ili forĝos siajn glavojn en plugilbekojn, kaj siajn lancojn en ĉirkaŭtranĉilojn; nacio ne alprenos la glavon kontraŭ alia nacio, nek ili lernos plu la militarton.«

Malpliigi la kvanton da krueleco, pro kiu multaj vivantoj suferas, estas alia el la celoj de la societo. Estas dezirinde, ke junaj personoj inspiriĝu per sentoj de respekto por vivantoj, kiuj devas plenumi devon en la transiro de la homaro el sovaĝeco en la plej altan civilizacion, — tiaj bestoj, kiaj ĉevaloj aŭ hundoj, ekzemple.

Kiel organizacio, la societo ne estas filiigita al iu ekzistanta filantropia aŭ krueleco-malhela societo, sed taŭgas kiel helpo al la

nunaj ambulancoj, limigi la okazon de tiom da vundado dum la daŭro de industria aŭ internacia malpaco.

La nuna malnovmoda kaj barbara metodo direkti disputojn de industriistoj certe devas ŝanĝiĝi baldaŭ al pli racia metodo.

Antaŭ ne longe la spektaklo estis videbla vidi registarajn kaj urbajn dungitojn—multaj el ili homoj, kiuj havas altan rangon de inteligenteco kaj karaktera delikateco—batalantaj per ŝtonoj aŭ bastonoj unu kontraŭ la alia, kaj poste bandaĝantaj la vundojn. Tia spektaklo estus nebla se la sistemo konsilita de la internacia Societo por la Paco estas akceptita. Tiuj homoj, konforme al la celoj de la societo, kiam ordonitaj de siaj respektivaj estroj ĵeti ŝtonojn aŭ uzi armilojn, penos, laŭ eble, malhelpi aŭ sin deteni de la vundado aŭ difekto de la aliaj, kaj anstataŭ tio, penos bandaĝi la vundojn de la difektitoj inter la kompatindaj kaj malbone gviditaj kamaradoj aŭ kontraŭuloj. Tamen eble ili devas obei la ordonojn de siaj estroj aŭ estroj. La apostolo diris, «Servantoj estu regataj de viaj mastroj . . .» 1 Pet. 2¹⁸.

Se estas vere, ke la klasoj de personoj en la socio konataj kiel profitemuloj kaj municuloj estis la veraj mastroj en la mondmilito kaj ke ili ne deziris fini la bataladon tuj, estas ankaŭ vere, ke tiuj personoj suferos terure de memriproĉo pro tio en la estonteco kaj ke ili estos tre malesperaj. En la 6a. ĉapitro de S. Luko oni povas legi pri la malfeliĉeco, kiu okazos al la riĉuloj kiam ili eltrovos la veron; tial ne estas prave esti venĝema kontraŭ ili.

LA EKLEZIA MONDO.

ANGLUJO.

LA EKLEZIA KONGRESO. Ĝus okazis la ĉiujara Kongreso de la Angluja Eklezio en *Birmingham* sub la prezido de lia moŝto, la Episkopo de tiu urbejo. Inter la paroladoj estis kelkaj sufiĉe alarmaj, kiuj kreskiĝos la maltrankvilecon pri la nacia moraleco. La Episkopo de *Guildford* preparolis la grandan plioftigon de eksedziĝo, la timigan disvastigon de venera malsano kaj de la prostitucio, asertante ke la nombro de sekretaj malĉastulinoj multe kreskis en ĉiuj rangoj kaj popolklasoj. Li juĝas, ke la normo de virina moraleco grave degeneras. Li ankaŭ montris, kiel aldonitan danĝeron, la pliiĝantan popularecon de la doktrino de tiu psikologaro, kiu instruas ke la ĉefa faktoro de la homa vivado estas seksa je origino. Aliflanke *Lord Dawson*, kuracisto ĉe la Reĝo, atakis la koncepton pri edzeco esprimitan lastan jaron

de la Episkopoj ĉe la Konferenco ĉe *Lambeth*: li nur modifeme kondamnis la uzon de rimedo kontraŭ gravediĝo, kaj opinias ke nasko-kontrolo en iuj cirkonstancoj estas necesa en moderna vivado. Rilate al la *Lambeth*'a Rezolucio (N-o 68) li diris, ke ĝia signifo estas ke seksa unuiĝo devas nur okazi por naskigo; li mem kredas, ke seksa unuiĝo kiel celo je si mem ne estas kondamnebla. Seksa amo, aparte de gepatreco, estas esencaĵo de edzecaj saneco kaj feliĉeco. La Episkopo de *Birmingham* per ampleksa parolado prezidanta ion kontraŭis al la nuntempa alarmitendenco: kvazaŭ starante sur alta monto kaj rigardante la mondvivadon sur la subaj ebenaĵoj, li vidas ĉiun trajton laŭ ĝusta perspektivo, kaj ŝajnas ke al li spektaklo estas ne tre nekontentiga; la Eklezio pli definitive enmetas sin en la koron de la nacia vivado, postulante akcepton de kristanaj principoj en la decido pri socia kaj morala ordo de la Regno; la Eklezio komencas realigi al si mem, ke ĝi devas havi novan koncepton pri aŭ, almenaŭ, restarigon de siaj funkcioj; oni devas forlasi la tendencon al malespero, kiun montris multaj eklezianoj, rilate la estontecon de la amasoj, ĉar tia sintenado tute ne estas inda je nacia eklezio. —

FIKSITA DATO POR PASKO. La propono anstataŭigi la variantajn datojn de Pasko kaj Pentekosto per fiksitaj datoj ricevas pliigantan favoron; kaj estas konstate, ke la Ĉefepiskopo de *Canterbury* promesis interkonsiliĝi kun aŭtoritatuloj de aliaj eklezioj por ekzameni la eblecon de interkonsentita agado rilate la aferon. Ni ne vidas rajton ŝanĝi la antikvan dataranĝon nur por koincidigi la datojn de popolaj libertempoj kun tiuj de la tagoj observataj de kristanoj. La nacio, se ĝi volas, fiksi siajn proprajn libertempajn datojn sendepende de la Eklezio: eĉ malgraŭ la fakto, ke ili devas labori tiujn tagojn, la fidelaj kristanoj observos la festojn; kaj la kristanoj ne plu ĉagreniĝos pro la nekonvenaĵoj de la popola observado de la sanktaj tagoj, kiuj ne malofte estas difektitaj per popolaj «plezuroj», kiuj ne estas kondamnindaj pro si mem sed estas certe nekonvenaĵoj kiam ili okazas, ekz., Grandan Vendredon! — *Redak.*

JUGOSLAVUJO.

LA POZICIO DE LA SERBA PASTRO. Malmultaj estas la landoj, kie la Eklezio tiom kunkreskis kun la nacia vivo, kiom en la serba lando. Dum kvincentjara turka regado la pastroj estis la solaj homoj, kiuj povis legi kaj skribi: ili do estis la unuaj historiistoj de Serbujo. Ĉiu politika agado, ĉiu diplomatia paŝo nepre bezonis partoprenon de la pastroj. Dum ribeloj kontraŭ la turkoj la pastroj aŭ persone luktis per bataliloj, aŭ sekrete subtenis la ribelintojn. En serba Montenegro la pastroj ĉiam portis militan veston; kaj la episkopoj estis iliaj monarĥoj. Kiam la serba popolo elmigradis el Turkujo la pastroj gvidis ilin: kvardek mil serbaj familioj forlasis sian naskolandon por

enmigri Aŭstrion sub konduko de Patriarĥo *Ĝarnojeviĉ*. Nun, en paca tempo, oni povas vidi en la valoj de ĉi tiu montega lando sur polva vojo rajdantan pastron serban, kiu vojaĝas en sia paroĥo por plenumi naciajn, religiajn ritojn hereditajn de la pratempo. Nur per tia historia rerigardo oni povas kompreni la intimecon de la pozicio de la serba pastro en la vivo de la nacio. *De nia Korespondisto en Serbujo*. Petro STOJAN.

LATVUJO.

GRANDA SANKTROCESIO EN MOSKVO. Dum la Festo de la Ĉieliro en Moskvo okazis grandioza sanktprocesio, en kiu partoprenis pli ol 150,000 personoj. Unuan fojon depost la enloĝiĝo de la komunistoj en la Kremlo (antikva preĝejo) estis malfermitaj por procesio ĝiaj pordoj. Je 12 horo tage la Ruĝa Placo, sur kiu okazis la festo, estis tute kovrita de popolamasoj kliniĝintaj. Beninte la popolon, Patriarko *Tihon*, Estro de la Rusa Eklezio, ekpaŝis kun sanktprocesio en kiu partoprenis la tuta moskva pastraro. Malantaŭe iradis kanthoro konsistanta el laboristoj kaj ruĝarmeanoj. Partoprenis ankaŭ la komunista polico.

SUB VERDA STANDARDO. La siberia gazetaro sciigas pri kresko de antikomunista movado inter muĥamedanoj sur religia bazo. La muĥamedana pastraro propagandas, ke la komunismo estas kontraŭa al la Eklezio. Se la propagando por sanktmilito kontraŭ la komunistoj ankoraŭ pli sukcesos, oni povas atendi partorpenon en ĝi almenaŭ de 300 milionoj da muĥamedanoj.

LATVIA ĈEFEPISKOPO. La 27an. de julio la latvian ĉefurbon *Riga* alveturis el Rusujo la estro de la ortodoksa religio en Latvujo, Ĉefepiskopo Johano. Grandaj sanktprocesioj renkontis lin ĉe alveturo, salutante lin pro atingo de lia celo — laboro en lia patrujo. La Ĉefepiskopo multe suferis en Rusujo, kaj kun doloro parolis pri la tieaj vivcirkonstancoj.

Ĉar pri nova perforta almito de Latvujo de la rusa flanko ne valoras pensi, la eklezia estreco de Latvujo disiĝas de la rusa patriarko *Tihon*. Ĉefepiskopo Johano tiel estos memstara gvidanto de la Ortodoksa Eklezio en Latvujo. *De nia latvia Korespondisto*, Z. INDRA.

NORVEGUJO.

NOVA PREĜLIERO. Depost advento 1887 oni en la Norvega Eklezio uzas tri jarkolektojn da perikopoj (dimanĉaj tekstoj) por la oficiala diservo. Samtempe estis enkondukata nova ordo de diservo (t.e., la ĝistiamaj ordo kompletigita laŭ praeklezia modelo), uzota tamen nur laŭ deziresprimo de ĉiu loka paroĥano. Sekvis iom post iom aliaj gravaj ŝanĝoj kaj aldonoj, ekzemple posttagmezaj aŭ

vesperaj eŭkaristiaj diservoj (depost novjaro 1895), komunio ne antaŭirata de konfeso, memkomunio de la pastroj, ritualo por la enoficigo por la eklezia sanktigo de edziĝoj, k. c. El ĉio ĉi tio fine rezultis nia nuna Preĝlibro (altarlbro, libro de liturgio), uzata depost la unua dimanĉo de advento 1920. Per ĝi la supre citita nova ordo de diservo estas oficialigita kiel la unusola, sekve deviga formo de la ĉefdiservo (dimanĉon antaŭtagmeze), tamen kun la tute nova reformo, ke la «komuna eklezia preĝo», kiun la pastro legas post la prediko, ne plu estas legata sur la pulpito sed antaŭ la altaro. Plie, je la komenco kaj je la fino de la diservo la preĝeto, kiun ĝis nun voĉlegis la diakono, estas anstataŭata per «silenta preĝo» de la ĉeestantaro, escepte se la loka paroĥanaro nepre deziras restigi la malnovan kutimon.

ĈU «MULIER TACEAT IN ECCLESIE») Sajnas ke la demando pri pastrinoj baldaŭ estos aktuala en nia eklezio. La virinoj jam de longe partoprenis misiajn kaj ekleziajn kunvenojn, kompreneble ne nur kiel aŭskultantoj; kaj, ĉar tiaj kunvenoj ofte havas lokon en la preĝejo, ili sekve rajtas, partoprenante la diskutadon «paroli» ankaŭ tie, nur ne «por edifo». Por kunhelpi al forigo de tia eble iom ridinda escepto kaj al ĉesigo de la teoria diskutado pri la ĝusta kompreno de *1 Kor. 14*³⁴ la paroĥestro de iu preĝejo en Kristiania unu dimanĉon en aprilo pasinta permesis al studentino de teologio prediki ĉe la posttagmeza diservo. Ŝi certe faris tion bone kaj dece; sed la afero kompreneble revigligis la diskutadon, dum unuj riproĉis la paroĥestron pro kontraŭleĝa procedo, aliaj bedaŭris, ke la leĝo estas tia ke ĝi preskaŭ devigas al kontraŭleĝa agado. Tamen kun tiu solvo de la demando, kiun evidente postulas la konsekvenco kaj la progresemo, ankoraŭ plejparte ne konsentas la publika opinio. *De nia norvega Korespondisto*, HONORATUS BONNEVIE.

POLUJO.

NOVA POLA TRADUKO DE LA NOVA TESTAMENTO. Ĉefepiskopo mariavitana D-ro Johano Mihaelo Kowalski denove tradukis la Novan Testamenton, kaj lia tradukaĵo multe superas la antaŭan, en kiu estis multaj eraroj kaj malklaraĵoj. Li ankaŭ denove tradukis la Psalmaron; kaj en la «Missale» kaj la «Breviario» la teksto evangelia kaj la Psalmaro estas tute renovigitaj.

RELIGIA VIGLECO. En Polujo (malgraŭ, ke la mastrumado socia en ĉiuj rilatoj malsaniĝas) en la religia sfero komenciĝis granda laboro. Krom la Mariavitanoj, kiuj fortege agadas por renaskigi la popolon evangelie, energias diversaj grupoj, precipe la Studentjunularo Kristana, kiu eldonas bonegan ĵurnalon nomitan «Czyn» («Ago»), kiu estas, klasike redaktata kaj pritraktas ĉiun fakon de la nacia, socia, praktiva vivado pola: ĝi estas ĉarmplena ĵurnalo kaj tute sub

la radio de la evangelia suno. La kristana junularo forte batalas tie ĉi kun viva efektiveco inter la inteligentularo. Alia fako, aganta ĉe plenkreskaj civitanoj, grupiĝis ĉe la gazeto »Novaj Vojoj» en *Lodz*, bone kun evangelia spirito redaktita per unuagrada literaturaj fortoj. Estas ankaŭ aliaj centroj de la nova evangelia viglezo. Tiuj nomitaj supre estas konfesie senpartiaj. La *Young Men's Christian Association* multe helpas.

MORTO DE FAMKONATA ABATINO. La 23-an. de Aŭg. mortis en *Plock* glorega en Polujo virino, Abatino *Maria Franciszka Kozłowska*, kiu fondis du religiajn monaĥajn ordenojn, kies celado estas tute mesiana por renaskigi kristane la polan popolon kaj la homaron. Ŝia verko estas Mariavitismo, aganta per monaĥa ligo de la katolikaj pastroj (sen papo) kaj pere de mariavitanaĵ fratinaj. Dank' al ŝi en Polujo komenciĝis nova epoko religia, — mesiana.

MORTO DE FAMKONATA PASTRO. La 6an. de Aŭg. mortis en *Dobra* pastro *Paulo Skilimowski*, kiu estis la speciala delegito al Papo *Pius 10a.* dum la disiĝo inter la Mariavitanoj kaj la Romkatolika Hierarkio en j. 1906. — *De nia mariavitana Korespondisto en Polujo*, ADAM FURMANIK, *Paroĥestro de LESZNO.*

RUSUJO.

STATISTIKO DE LA RIĈAĴOJ FORPRENITAJ DE LA MONAĤEJOJ. Oni kalkulas, ke oni forprenis de la monaĥejoj, kaj donis al kamparanoj (kiuj havis en Rusujo tre malmulte de tero) 826,540 hektarojn da tero, 84 fabrikejojn, 1,112 grandajn domojn, 704 hotelojn, 277 malsanulejojn kaj edukejojn, k. t. p. Ĝis 1917 loĝis en monaĥejoj 52,832 monaĥoj kaj servantoj. Post la revolucio oni loĝigis en monaĥejoj 1,680,000 laboristojn, infanojn kaj kamparanojn. Estas organizita de ili 46 resanigejoj, 97 lernejoj, 287 ŝtataj domoj, 188 militaj domoj, kaj 319 malsanulejoj. Oni raportas, ke per la fermo de la monaĥejoj la bolŝevika Registaro entute akiris la grandegan monsumon 4,247,667,520 rublojn. Ni citas ĉi tiujn ciferojn el letero ricevita de persono, kiu favoras la bolŝevikan reĝimon, kaj ni konstatas, ke ili estas laŭ la kalkuloj de la Registaro. La ciferoj diversmaniere pensigas nin. En Rusujo kaj la apudaj landoj unuj demandas kial la diservistoj gajnis kaj konservis tiom da havaĵoj spite siaj kristanaj principoj, kaj aliaj juĝas, ke la fermo de la monaĥejoj kaj la forpreno de tiuj riĉaĵoj estis granda maljustaĵo kaj peka rabago. Eble la forpreno de la troa riĉeco de la Eklezio ne alportos la malfortecon nek la malfeliĉecon al la rusa kristanaro; ĝi eĉ povas iĝi pli fortika kaj pli forta pro la revolucia persekuto. Signoj de tia rezulto eĉ nun ne mankas. *Redak.*

KIOM DA PREĜEJOJ KAJ MONAĤEJOJ ESTIS EN RUSUJO. Ĝis la Revolucio en Rusujo estis pli ol 50,000 preĝejoj. El ili 38,000 estis paroĥaj preĝejoj; 800 katedraj preĝejoj; ĉirkaŭ 12,000 estis en reĝaj palacoj, regnaj domoj, privataj domoj, lernejoj, sur tombejoj, k. c. Krom tio estis 26,000 preĝdomoj kaj preĝejetoj. Estis ankaŭ 500 monaĥejoj kaj 400 monaĥinejoj. Nuntempe preĝejoj en palacoj regnaj domoj, lernejoj, k.c. estas fermitaj*; same estas fermitaj 673 monaĥejoj kaj monaĥinejoj. Paroĥaj preĝejoj ĝis nun ekzistas. — *De nia Korespondisto en la Rusa Ortodoksa Eklezio, Pastro K. M. KOLOBAŠKIN.*

SVEDUJO.

TAGO DE LA MALGEJUNULOJ. La juneco estas vere la printempo de la homa vivo, tiam ĉio bele brilas. La gejunularo estas forta, ĝoja kaj — estimata. La eklezio tre ŝatas ĉiun novan junan forton, kiu eniras la eklezian movadon, kaj estas ne strange, kun la gejunularo, la eklezio estas forta kaj povas progresi labori.

Tamen ĉiuj estas ne junaj, multaj el niaj geanoj staras en la aŭtuno de la homa vivo. Ilin ni eble ofte forgesas, kaj tamen ili antaŭe bone batalis; ni junuloj ĝuas la fruktojn de ilia diligenta laboro kaj bezonas ankoraŭ la saĝajn konsilojn de ili.

Kial ne iam honori ilin publike? Kial ne aranĝu tagon de la malgejunuloj? Multaj baptistaj eklezioj antaŭnelonge aranĝis tian tagon, kaj ĝi estis ĉiel bona. Ni dankas al Dio pro la penso pri tiu tago, kaj lasas la penson plue iri. — *De nia Korespondisto GEORG FRIDEN.*

LA PRINCIPOJ KAJ ORGANIZADO DE LA ĈEĤOSLOVAKA EKLEZIO.

DE K. FARSKÝ, D. T.

[Noto: *La verkinto de ĉi tiu artikolo estas unu el la kondukantoj de la vigla religia movado, kiu nuntempe okazas en Ĉeĥoslovakujo, kaj havis gravan partoprenon en la fondo de la memstara Eklezio de tiu lando. Legantoj bonvenigos lian bonan klarigon pri la spirito, cirkonstancoj, fundamento, k. c., de lia Eklezio. — Redak.]*

Grandan atenton de la tuta mondo vekas la religiokultura movado ĉeĥa, konata sub la nomo »Eklezio Ĉeĥoslovaka«. La ĉeĥanacio, je naŭ dekonoj nekatolika antaŭ la batalo de Blanka Monto,

* Tiuj ĉi preĝejoj ne plu ekzistas. Ilia tuta havaĵo estas transdonita al lokaj paroĥaj preĝejoj laŭ la Dekreto de la Sovjeta Registaro.

estis post tiu ĉi batalo per dekreto de la imperiestro Ferdinando II donita al Romo, kun korpo kaj animo, kun ĉiuj preĝejoj kaj ilia apartenaĵo, sub mortpuno. Tamen la nacia animo ĉeĥa ne forgesis, ke ĝia origina kulturo kristano inokulita per Kirilo kaj Metodio estis ĉeĥoslovaka, ke ĉeĥaj eminentuloj: *Ludmila, Vaclav*, la Boleslavo, la Vratislavo, *Oldřich* kun *Prokop* kaj *Břetislav*, eĉ Karolo IV (monaĥejo »*Na Slovanech*»), kaj precipe Majstro *Jan Hus*, la Husanoj kaj la Bohemaj Fratoj kun la lasta episkopo *J. F. Komenský* ĉiam ree kaj denove penis je memstara ĉeĥoslovaka evoluo de kristana kulturo, neakordigebla kun la senerareco de la roma eklezio. Dum trijarcentoj la nacio troviĝis en manoj de Romo, helpe de habsburga dinastio. Post falo de tiu ĉi dinastio liberiĝis la ĉeĥa animo eĉ religie kaj eklezie. Post renverso de 28 oktobro 1918 la ĉeĥa pastaro, kies situacio fariĝis malfacile haltebla, postulis reformojn. Oni intencis emancipi la pastraron kaj tiel ankaŭ la eklezian vivon de la papa superregado. La reformoj estis de Romo iom trorapideme rifuzitaj, kvankam sufiĉis aprobi starigon de ĉeĥoslovaka patriarkeco, influon de la pastraro je elekto de episkopoj, ĉeĥan lingvon diservan anstataŭ la latina, kaj reguligon de familia vivo de la pastraro per liberigo rilate al edzeco (ĝis nun estis deviga fraŭleco ĉe la pastroj). Sekve de rezisto de la roma kurio estis fondita en Praha en septembro 1919 »Klubo de reformema pastraro» sub prezido de la verkanto de tiu ĉi artikolo; kaj jam la okan januaron, 1920, oni decidis je kunveno de ĉi tiu klubo en *Snūchov* fondi memstaran eklezion ĉeĥoslovakon.

Ĝian idean fundamenton formas libereco de konscio kaj religia konvinko de ĉiu individuo. Dogmaran bazon formas dume la kredo de la unuaj jarcentoj kristanaj ĝis j. 787 (sepa Interkonsiliĝo en *Nizza*), sed nur kiel aprobita dokumento de siatempa religia evoluo de kristaneco; ĉar je la kongreso de la delegitoj de ĉiuj komunumoj de Ĉeĥoslovaka Eklezio la 8. kaj 9. januaron, 1921, estis akceptita direktodona principo, ke eĉ la religio estas submetita al evoluo paralele kun la kultura evoluo de homa spirito, kaj ke precipe eklezio de la 20a jarcento ne povas malaprobi la rajtigojn de scienca kritiko eĉ en sfero religia, tiel ke ne povas esti deviga artikolo de kredo tio, kio ne akordiĝas kun certega esploro de la samtempa scienco. La ĉefa tasko de la Ĉeĥoslovaka Eklezio nepre estas suprenlevo de religia sento, vekigo de vera frata amo je proksimuloj kaj forigo de envio kaj malamo religia, nacia, klara, ekonomia, politika kaj familia.

Renovigi honestan, afablan kaj ofereman homon en senco de Kristo estas programo de Ĉeĥoslovaka Eklezio.

La tiucelaj helpiloj de Ĉ. E. estas simplaj, harmoniantaj kun la nacia tradicio. Oni starigas religiajn komunumojn (kelkaj kalkulas eĉ pli ol dek milojn da anoj, ekz. *Praha I, Praha VIII, Žižkov, Nusle, Vinohrady, Budejovice, Caslav, Olomouc* k. a.); la komunumoj estas administrataj de elektita konsilantaro de presbiteroj; la komunumo ankaŭ voĉdone elektas la pastron kaj prizorgas financon flankon. La ĉsl. respubliko kontribuas ja en j. 1921 je romkatolika eklezio per 78 milionoj da Kč, malgraŭ la riĉeco posedata de ĉi tiu eklezio, sed al la Ĉ. E. ĝi kontribuas ĝis nun per nenio, tial tiu ĉi vivotenas sin mem per libervolaj depagoj de la membraro.

La diservoj, kiel la meso tiel ankaŭ la ceteraj estas celebrataj ĉeĥe, per ordo ne plu roma, sed propra, en senco de la aprobitaj principoj de la Ĉ. E. Per funkcioj oni servas al ĉiu egale, li estu riĉa aŭ malriĉa. La stoltakson ne enspezas la pastro, sed la konsilantaro de presbiteroj en formo de monoferoj. La religia klerigado estas organizata tre zorgoplene laŭ deziro de la anaro mem. En la komunumoj estas aranĝata bonfara agado. La tuta edukado celas la spiritan memkonscion. El la biblio, kiu estas bazo de instruado, oni akcentigas momenton etikan, ne miraklodoktrinan. La pastro devas montri modelan vivon privatan, li estu fraŭla aŭ edziĝinta. La situacio de la pastroj egalas tiun de oficistoj.

La centran administradon prizorgas centra komitato, funkcianta pere de elektata konsistorio (*Praha I, Kostečná str.*). En centra komitato la nombro de pastroj ne devas superi unu trionon, kaj ĝi efektive ĝin eĉ ne atingas. En ĉiuj konsilantaroj funkcias eĉ virinoj.

La traktado pri la reguligo de la pastrigado ne estas ĝis nun solvita. Tiucele la Ĉ. E. ekinterrilatis kun la serba eklezio, kvankam ekzistas ja forta opinio, kiu intencas ekligi rilatojn kun la mondo angloamerika, aŭ ĝenerale agi propramane. La problemo nepre devas esti solvita jam tre frue.

La nombro de la paroĥoj nun en februaro 1921 atingas eble 70; post la popolsumigo oni devos fondi multegon da novaj paroĥoj, ĉar oni povas taksi la nombron de la anaro minimume je unu duonmiliono, en *Praha* mem je cent miloj. Kaj la movado kreskas ĉiam pli kaj pli, eĉ larĝen eĉ profunden, nehaltigeble, tiel ke la Ĉ. E. transprenas la ĝisnunajn romkatolikajn poziciojn kaj paroĥojn eĉ kun preĝejoj kontinue, plenigante tiamaniere la plej efikan disigon

de ŝtato kaj eklezio en plej interna intereso de la ŝtato kaj de religia vivo, kiun la reganta eklezio romkatolika karikature ŝanĝis en agitadon politikan. Tial la E. Ĉ. ĝuas ĝeneralajn simpatiojn de sinceraj kulturaj laborantoj kiel senkonfesiaj, tiel ankaŭ de ĉiuj kristanaj eklezioj eksterromaj en la tuta mondo.

Tradukis ĉeĥa lingvo Voĉo.

LEĜKONDICIOJ DE LA RUSA EKLEZIO.

Noto: Per la sekvantaj ĝustaj tradukaĵoj de kurantaj leĝdokumentoj ni klare prezentas la interrilatojn de rusaj paroĥoj al la ŝtato. Nuntempe en aliaj landoj ekzistas multe da malkompreniĝo pri tiuj interrilatoj kaj ankaŭ ĝenerale pri la viv- kaj labor-kondiĉoj de la Rusa Eklezio. Pastro K. M. Kolobaŝkin, kiu mem estas rusa paroĥestro, bone servas al la Eklezia Revuo per sciigo de la faktoj laŭ la propraj sperto kaj vidpunkto. — Redak.

Teksto de la Kontrakto, kiun faris paroĥanoj de ĉiuj paroĥoj en Rusujo kun siaj lokaj Plenumaj Komitatoj de la Konsilantaroj de Soldat-, Laborist-, kaj Vilaĝanar-Deputitoj.

KONTRAKTO.

Ni malsupre subskribintaj loĝantoj de (nomo de urbo aŭ vilaĝo) faris tiun ĉi Kontrakton kun (nomo de vilaĝo aŭ urbo, kie troviĝas loka Plenuma Komitato) Plenuma Komitato, nome kun ĝia reprezentanto (ofico, nomo kaj antaŭnomo de reprezentanto) pri tio, ke (dato) (monato) (jaro) ni akceptis de (nomo de urbo aŭ vilaĝo, kie troviĝas P. K.) Plenuma Komitato, je senlinterpa, senpaga uzado, troviĝantan en (nomo de urbo aŭ vilaĝo) preĝejon, kun necesaj por diservo sanktobjektoj laŭ listo de ni subskribita, je jenaj kondiĉoj:

(1) Ni malsupre subskribintaj civitanoj promesas gardi al ni transdonitan popolan havaĵon kaj uzadi ĝin nur konforme al ĝia destino, prenante sur nin tutan respondecon por konservado de la transdonita al ni havaĵo kaj same por plenumo de la alprenitaj de ni laŭ tiu ĉi Kontrakto aliaj devoj.

(2) La preĝejon kaj troviĝantajn en ĝi sanktobjektojn ni promesas uzadi, kaj al niaj samreligiaj permesos uzadi ilin ekskluzive por kontentigo de religiaj postuloj (bezonoj).

(3) Ni promesas zorgi pri tio, ke la transdonita al ni havaĵo ne estu uzota por celoj, kiuj ne konformas al §§ 1 kaj 2 de tiu ĉi Kontrakto.

Private, en la akceptitaj de ni preĝejoj ni promesas ne permesi:

(a) politikajn kunvenojn, kiuj havos malamikan direkton kontraŭ la Sovjeta potenco,

(b) disdonadon aŭ vendon de libroj, libretoj, folioj kaj epistoloj, kies enhavo estas kontraŭ la Sovjeta potenco aŭ kontraŭ apartaj ĝiaj reprezentantoj,

(c) predikojn kaj paroladojn kontraŭ la Sovjeta potenco aŭ kontraŭ apartaj ĝiaj reprezentantoj, kaj

(d) alarmojn por kunvoko de loĝantoj, celante ribeligi ilin kontraŭ la Sovjeta potenco; pro tio ni promesas plenumi ĉiujn ordonojn de la Plenuma Komitato koncerne uzadon de la sanoriloj.

(4) Ni promesas el niaj propraj enspezoj pagi diversajn elspezojn (kaj ŝuldojn) por asekuo, rekonstruo, hejto de la preĝejo.

(5) Ni promesas havi liston de la tuta preĝeja havaĵo en kiun ni devos enskribi ĉiujn sanktobjektojn (kiujn oni donacos aŭ transdonos el aliaj preĝejoj, k. t. p.), kiuj ne apartenas al apartaj personoj.

(6) Ni promesas permesi al reprezentantoj de la loka Plenuma Komitato periode revizii la preĝejan havaĵon dum postdiserva tempo.

(7) Por vendo aŭ difekto de la transdonitaj al ni objektoj ni respondas materie, konforme al difektita havaĵo.

(8) Ni promesas, se okaze de redono de la de ni akceptita havaĵo, redoni ĝin en sama stato en kia ĝi estis de ni akceptita por uzado kaj gardo.

(9) Por neakcepto de ni de ĉiuj dependantaj de ni rimedoj por plenumo de la devoj, kiuj sekvas el tiu ĉi Kontrakto, aŭ por ĝia rekta rompo, ni respondas laŭ la tuta severeco de la revolucia leĝaro, kaj tiu ĉi Kontrakto povos esti nuligita.

(10) Se okaze ni ekvolos nuligi tiun ĉi Kontrakton, ni devos sciigi la lokan Plenuman Komitaton pri tio; tamen dum semajna templimo de post la tago de la forsendo de la petskribo al la loka Plenuma Komitato ni opinios nin kunligitaj per tiu ĉi Kontrakto kaj respondos por ĝia plenumo kaj ankaŭ ni promesas dum tiu ĉi limtempo redoni la akceptitan de ni havaĵon.

(11) Ĉiu el ni, kiuj subskribis tiun ĉi Kontrakton, povas eksigi sin el la nombro de la partoprenantoj de tiu ĉi Kontrakto, sendinte skribpeton al la loka Plenuma Komitato, kvankam tio ne liberigas eksigintan personon de respondeco por tuta difekto kaŭzita al la popola havaĵo* dum tiu tempperiodo, kiam li partoprenis en uzado kaj administro je la havaĵo ĝis forsendo de skribpeto pri eksigo al la loka Plenuma Komitato.

(12) Neniu el ni kaj ni ĉiuj kune ne havas rajton rifuzi al iu ajn el regnantoj apartenantaj al nia religio kaj juĝe ne kondamnitaj

* Popola havaĵo. — La preĝeja havaĵoj en Rusujo estas laŭ la Dekreto de la Sovjetregistaro propraĵo de la tuta rusa popolo, sed ne apartaj parohoj. El tiu ĉi Dekreto sekvas, ke sanktobjektoj de kristanaj preĝejoj egalmezure apartenas kiel al kristanoj, tiel same al Mahometanoj kaj aliaj idolanoj!

subskribi poste tiun ĉi Kontrakton kaj partopreni en administro je la havaĵo, nomita en tiu ĉi Kontrakto, je ĝeneralaj kondiĉoj, kiun ĉiuj ni subskribis.

La Originalo de la Kontrakto estas konservata en la Arĥivo de (nomo de urbo aŭ vilaĝo) Plenuma Komitato, sed atestita kopio de ĝi estas donita al la paroĥanoj subskribintaj ĝin kaj ricevintaj laŭ la listo por uzado ejojn por Diservo kaj troviĝantajn en ili sankt-obtektojn destinotajn por religiaj celoj.

(Sekvas subskriboj de paroĥanoj kaj de reprezentanto de Plenuma Komitato.)

DEKRETO

pri religiaj ceremonioj kaj ritoj:

(1) En regnaj kaj en aliaj publikaj, regnaj, sociaj ejoj* ne estas permesataj:

- (a) religiaj ceremonioj kaj ritoj (ekz., Diservoj, rekviemoj, k.c.)
- (b) lokigo de iaj ajn religiaj bildoj, pentraĵoj, skulptaĵoj, de religia karaktero, k.a.

(2) La loka Sovjeta Estraro zorgas pri forigo de la suprenontritaĵoj okazoj, plenumante la Dekreton de la Sovjeta Registaro pri libereco de konscienco. (Rimarko: Pri forigo de religiaj bildoj, kiuj havas artan aŭ antikvan (historian) signifon, kaj pri ilia estonta destino la loka Plenuma Komitato sciigas la Popolklerigan Komisarierojn).

(3) Religiaj procesioj kaj ankaŭ aranĝoj de iaj ajn religiaj ritoj sur stratoj aŭ sur placoj estas permesataj nur post skribpermeso de la loka Sovjeta Estraro, kiun la organizantoj ĉiun fojon devos ricevi ĝustatempe, tamen ne malpli ol du tagoj antaŭ publika realigo de religia ceremonio. Permesante organizi la ceremoniojn, la loka Plenuma Komitato havas por si fundamento § 5 de la Dekreto pri Disigo de la Eklezio de la Regno.

(4) La loka Sovjeta Estraro mem forigas aŭ ordonos al respektivaj personoj forigi el preĝejoj kaj aliaj preĝdomoj, kiuj estas popolhavaĵoj, ĉiujn objektojn, kiuj ofendas revolucian senton de la labora popolo, nome: marmorajn tabulojn, surskribaĵojn sur muroj aŭ sur sanktobjektoj, faritajn por eternigi memoron pri iuj ajn personoj el la familio de la eksigita dinastio kaj ĝiaj kunhelpantoj.

DEKRETO

pri religia instruado en lernejoj:

(1) Ĉar la popolkleriga afero estas alprenita de la Eklezio religia instruado de ia ajn religio ne estas permesata en regnaj lernejoj nek en la privataj, krom en la speciale teologiaj lernejoj.

(2) Ĉiuj pastraj lernejoj de ĉiuj religioj, ankaŭ ekleziaj lernejoj malsuperaj, kiel popola havaĵo estas transdonataj al la loka Plenuma Komitato aŭ al la Popolkleriga Komisarieroj.

El la rusa lingvo tradukis Pastro K. M. KOLOBAŠKIN.

* ekz., en lernejoj, masanulejoj, poŝtejoj, k. t. p.

LA REVIVIGO DE LA HEBREA LINGVO.

(La sekvanta artikolo aperis en *The Palestine Weekly*, 15 Aprilo 1921, okaze de la eldono de la kvina volumo de la »*Millon*«, aŭ *Thesaurus totius hebraicitatis et veteris et recentioris*, kiun verkis *Elieser Ben Jehuda*, Berlinon, 1921. Noto de la Tradukinto).

Antaŭ kvardek jaroj oni preskaŭ dirus, ke la hebrea lingvo jam mortis; Ĝi estis la lingvo liturgia de la Sinagogo, kaj kelkaj personoj, se nesesege, povis uzi ĝin kiel fuŝa interparolilo tiam, kiam Judo orienta deziris fari negocon kun Judo okcidenta. Sed neniu uzis ĝin propravole; certe ne pensis en ĝi, nek konservis ĝin kiel sian patrolingvon. Jam kelkajn jarojn oni eldonadis hebrelingvaj gazetojn, sed la lingvo havis karakteron artifikan, pedantan, fi-belan — tian, kian oni kutime aŭdas dum Latinaj paroladoj ĉe la universitataj diplomceremonioj.

Poste venis al la Sankta Urbo malgranda viro, kiu diris »Mi ĉiam hebree parolos!« kaj li hebree parolis; kaj per volpovo ridinde malproporcia je la enhavanta korpo, kaj per persista batalemo konsterniga por pripensi, li hebregis ankaŭ aliajn. Li edukis infanojn kaj igis ilin paroli hebree de post la lulilo: liaj infanoj estis la unuaj, post dudek jarcentoj, hebree dentumintaj kaj kriegintaj. La entuziasmo kreskis nur grade de familio al familio; unuon post post unuo naskiĝadis generacio, kiu sciis nur la hebrea lingvon; oni starigis malmultnombrajn asociojn por protekti ĉi tiun delikatan kreskaĵon, kaj ankaŭ por helpi eltrovi novajn vortojn por modernaj ideoj aŭ objektoj, aŭ restarigi malnovajn vortojn el la vastaj amasiĝoj de la mezepoka literaturo hebrea. Lernejoj »kindergartenaj« estiĝis por deteni la hebreajn infanojn de la infekto de jam en lernejoj uzataj lingvoj judaĉa, rusa, germana; kaj ekaperis ĵurnaloj uzantaj jam la unuan fojon lingvon, kiu celas simplecon kaj naturecon.

Tiel progresis la movado, dum ĝia genio senlaca, servema, stimulis la fervoretajn, ne lasante ilin ekĉesi, erupcia sub la premo de kontraŭstaro, senĉese elserĉante novajn rimedojn, adamanta kontraŭ ia koncedo, nekontraŭstareble sincera, vidante nur unu vivcelon — nome, ke lia popolo paroladu la lingvon de siaj prapatroj antikvaj en sia antikva lando.

Sed oni bezonas pli ol entuziasmon, por rekrei lingvon, dum ĉirkaŭ du mil jaroj ne uzitan de la popolo. Tiu ĉi *Thesaurus* donas al ni tre instruan vidon sur la alia flanko — tiu seninteresa, malfacila, senfina daŭrado en la studo, kiu sola ebligis la lingvon ekhavi ĝian propran lokon en la strato kaj la vendejo. Grandegan literaturon oni devis dragi kaj ekzameni por trovi forgesitajn vortojn, kiuj plenumos modernajn bezonojn; elfosi radikojn el la hebrea kaj ankaŭ la parencaj lingvoj, reformi kaj alfari ilin kiel derivaĵoj, por ebligi la plej konkretan el la antikvaj lingvoj ricevi formon, kiu pli bone esprimos

la fuŝan malkonkretecon de tiom da hodiaŭa pensado. Kaj plue, oni devis krei vortojn por esprimi la novajn ideojn kaj novajn materiajn kontribuojn de la moderna vivado — ĝiajn pragmatismen kaj patriotismen, ĝiajn submarŝipojn kaj entreprenemon, ĝiajn bacilojn, kaj gramofonojn, ĝiajn ĵurnalojn kaj proporcian riprezentadon.

Tiu ĉi *Thesaurus* (eĉ la vorto *Millon* mem devis estis kreita por traduki 'vortaro') estas do la rezultato de tiuj kvardek jaroj de revivigemado kaj misia laboro; al la unusola viro — jen la miraklo — estas donita la povo batali publike pro la lingvo kiel ĵurnalisto kaj publicisto, kaj samtempe malkaŝi kaj orde elmontri ĝian riĉecon pro la kleruloj kaj la verkistoj.

El la angla tradukis L. A. LONG.

RELIGIAJ PENSOJ DE J. W. von GOETHE

(1749—1832).

[Ni tradukis kelke da citaĵoj el la verkoj de Goethe rilatantaj al la religia konvinko kaj pensmaniero de tiu eminenta viro, esperante, ke ankaŭ la negermanaj samideanoj interesiĝos pri tio. Tradukinte ni sekvis la ordon de la germana libreto „*Meine Religion*“, *Vertrauliche Reden von J. W. von Goethe*, kolektaĵoj de Dr. Wilhelm Bode. (2. Aufl. Berlin 1902. E. S. Mittler & Sohn). — Noto de la Tradukintoj].

En nia plej profunda koro penado viglas,
 Sin fordoni al io pli alta, pli pura, ne konata, —
 Dankeme sen devigo,
 Malkaŝante sin al la eterna nenomeblo;
 Tion ni nomas: Esti pia.

La pieco ne celas ion, sed estas perilo por atingi la plej altan kulturon per plej pura animtrankvileco. Esti esplorinta la esloreblon kaj trankvile adori la neesloreblon, tio estas la plej bela feliĉo de homo pensanta. Konfesi Dion, kie kaj kiel ajn li sin faras ekkonebla, tio estas la reala surtera beateco.

La homo ne naskiĝis por solvi la problemojn de la mondo, sed certe por serĉi kie problemoj komenciĝas, kaj por resti inter la limoj de la kompreneblo. Liaj kapabloj ne sufiĉas por mezuri la okazantaĵojn de universo, kaj rilate al lia limigata horizonto la klopodo, racie bazi la universon, estas tre vana celado. La homa kaj la dieca racioj estas du aferoj tute malsamaj.

La homoj traktas Dion, kvazaŭ li, la neimagebla, per pensoj neniam komprenebla, plej alta estaĵo, ne estus pli multe ol iu iliaspeca. Alie ili ne dirus: La granda Dio, la kara Dio, la bona Dio. Li fariĝas

por ili, precipe por la ekleziuloj, kiuj ĉiutage lin menciadas, nura frazo, nura nomo, kiu vekas en ili nenian ajn senton. Se ili sentegus lian grandecon, jen ili mutiĝus kaj pro adoro ne volus nomi lin.

Ne ekzistas io pli blasfemia ol la malnova dogmatiko, kiu ŝajnigas Dion kolera, furioza, nejusta, partia.

Malantaŭ ĉiu estaĵo staras la pli alta ideo. Ĝi estas mia Dio, la Dio, kiun ne ĉiuj eterne serĉas, esperante ekvidi lin; sed ni nur povas lin sciiti, ni ne povas lin vidi. Mi ne demandas, ĉu tiu plej alta estaĵo havas intelekton aŭ racion, sed mi sentas: Li mem estas la intelekto, la racio. Ĉiuj kreitaĵoj sentegas tion, kaj la homo havas de ĝi tiom, ke li kapablas, ekkoni partojn de la plej alta.

Dio estas efikanta en la aĵoj ŝanĝigantaj, sed ne en la faritaj kaj senviviĝintaj. Tial la racio, pro sia tendenco al Dio, rilatas nur al la objektoj estiĝantaj, vivantaj, sed la intelekto al la estiĝintaj, senviviĝintaj por ke ĝi uzu ilin.

Kiam oni demandas min, ĉu laŭ mia naturo mi adorante honoras Kriston, mi diras: Nepra! jes! Mi klinas min antaŭ li kvazaŭ antaŭ la dia revelacio de la plej alta moraleca principo. Kiam oni demandas min, ĉu estas laŭ mia naturo, adori la sunon, mi ree diras: Nepra! jes! Ĉar ankaŭ ĝi estas revelacio de la plej alta kaj vere la plej impona revelacio, kiu estas videbla al ni, terinfanoj. Mi adoras ĝin la lumon, kaj la naskantan forton de Dio, per kiu sole ni ja vivas, agas kaj ekzistas.

Aŭskultante la ĉiutagan paroladon oni preskaŭ povas opini, ke la homoj konvinkigis, ke depost tiu iama tempo Dio estas tute sin retirinta en la trankvilon kaj ke nun la homo estas starigita sur propraj piedoj por provi, kiel li povas sukcesi sen Dio kaj ties ĉiutaga elspirado nevidebla. Rilate al religiaj kaj moralaj aferoj oni ja eble koncedas dian influon, sed rilate al scienco kaj artoj, oni kredas, ke ili estas io nur tera kaj nepraprodukto de nur homaj fortoj; sed oni provu do kaj kreu per homa volado kaj homaj fortoj ion kompareblan al la verkoj, kiuj portas la nomojn *Mozart*, *Rafael* aŭ *Shakespeare*. Mi tre bone scias, ke tiuj ĉi tri nobluloj nepra ne estas la solaj kaj ke en ĉiuj regionoj de l'arto kreadas sennombraj eminentuloj, kiuj starigis same perfektajn verkojn kiel la ĵus nomitaj. Nu bone, se ili estis same eminentaj kiel tiuj, ili superas la ordinaran homnaturon en la sama proporcio kaj estis dioplenaj same kiel tiuj.

Dio post la konataj ses bibliaj kreotagoj ne ekripozas; kontraŭe li estas ankoraŭ daŭre aganta kiel dum la unua. Kunmeti tiun ĉi masivan mondon el simplaj elementoj kaj ruligi ĝin jare kaj jare en la radioj de la suno, tio certe estus malmulte amuzinta lin, se li ne estus intencinta, fondi al si mem sur tiu ĉi materia fundamento kreskejon por mondo da spiritoj. Tiamaniere en la pli altaj naturoj li nun estas daŭre aganta por pli altigi la malpli altajn.

Ĉiu genia produktiveco, ĉiu sagaca spritdiro, ĉiu eltrovo, ĉiu granda penso, kiu portas fruktojn kaj havas sekvojn, estas en nenies

potenco kaj superas ĉiun teran forton. Ĉion tian la homo devas konsideri kiel surprizan donacon de supre, kiel nurajn infanojn de Dio, kiujn li akceptu kaj honoru kun ĝojplena danko. En tiuj rilatoj la homo ofte devas esti konsiderata kiel ilo de pli alta mondregado, kiel ujo indigata por akcepti Dian influon. Mi diras tion pripensante, ke ofte eĉ nur unu penso alian formon donis al tutaj jarcentoj, kaj ke nur kelkaj homoj per tio, kio eliris de ili, al sia epoko enprenis stampon, kiu estis ekkonebla kaj estis benefikanta ankoraŭ por la sekvantaj generacioj.

Kepler diris: Mia plej alta deziro estas, ke mi ekkonu la Dion, kiun mi renkontas ĉie ekstere ĉirkaŭ mi, — ankau interne en mi! —

La nobla viro ne konsciis, ke precize en tiu momento la Diaĵo en li kunmetiĝis kun la Dieco en la universo.

Ĉiu rakonto pri bona faro, ĉiu rigardado al harmonia objekto kortuŝas nin; ni sentas ĉe tio, ke ni ne tute estas sur fremdlando; ni revas esti pli proksime al iu hejmlando, kiun niaj plej bonaj, plej internaj sentoj alcelas senpacience. Se Dio ne estus enplantanta en la birdon la potencegan amon al siaj idoj, kaj se la sama sento ne estus trovata en ĉiu vivanta estaĵo de la tuta naturo, la mondo ne povus plue ekzisti; sed nun la Dia forto disvastiĝis ĉien, la eterna amo estas ĉie efikanta.

La demando pri la celo, la demando «kial?» estas neniel scienca. Sed iom pli progresigas nin la demando «kiel?» Ĉar la demando: kiel la bovoviro ekhavis kornojn? kondukas min al la observado de ĝia strukturo kaj samtempe min instruas, kial la leono ne havas kaj ne povas havi kornojn. Simila afero: La homo havas en sia kranio malplenajn kavaĵojn. Per la demando «kial?» ni ne multe progresus tie ĉi, sed la demando «kiel?» instruas min, ke ĉi tiuj kavoj estas restaĵoj de besta kranio, kiuj troviĝas pli altgrade ĉe tiaj pli humilaj estaĵoj, kaj kiuj ne jam tute malaperis ĉe la homo malĝraŭ lia supereco.

La utilitarismanoj opinius perdi sian Dion, se ili ne povus adori ĝuste tiun, kiu donis al la bovoviro la kornojn, por sin defendi; sed al mi oni permesu adori tiun, kiu estis en la riĉeco de sia kreado tiom potenca, krei post miloj da plantoj ankoraŭ unu, enhavantan ĉiujn ceterajn, kaj post miloj da bestoj estaĵon, enhavantan ĉiujn: la homo.

Oni adoru plue tiun Dion, kiu donas al la bruto ĝian nutraĵon kaj al la homo tiom da manĝaĵo kaj trinkaĵo, kiom li volas konsumi: sed *mi* adoras lin, kiu metis en la mondon tian produktadan forton, ke, se nur la milionono da ĝi ekvivas, la mondo svarmas per kreitaĵoj tiom, ke milito, pesto, superakvo kaj brulado nenion povas malutili al ĝi. Li estas mia Dio!

Vere, pri Dio mi do nenion pli povas scii, ol pro kio la nevasta horizonto de perceptoj sur tiu ĉi planedo rajtigas min, kaj tio estas ĉiurilate malmulta; sed el tio neniel rezultas, ke tiu ĉi limigo de niaj naturoservadoj ankaŭ konstruas barilojn al la kredo.

Male, ĉar ni senpere sentas la diecon, facile povas okazi, ke la

scio devas esti rigardata kiel fragmenta, ĉefe sur planedo, kiu, elŝirita el sia tuta interligo kun la suno, lasas ne perfekta ĉiun kaj ĉian konsideron, kiu ja pro tio ricevas sian plenan kompletigon nur per la kredo.

Mi por mi men, pro la multspecaj celadoj de nia naturo, ne povas kontentiĝi per unu pensmaniero; kiel poeto kaj artemulo mi estas politeisto, kontraŭe pauteisto kiel naturscienculo, kaj la unu same decidite kiel la alia. Se mi bezonas dion por mia persono kiel morala homo, ankaŭ tio estas prizorgita. La ĉielaj kaj teraj aferoj formas tiel vastan regionon, ke la organoj de ĉiuj kreaĵoj nur kune povas ĝin kompreni.

Se iu estas tiel maljuna kiel mi, ne povas manki, ke li pensas kelkfoje pri la morto. Min tiu penso nepre lasas trankvila, ĉar mi estas tute konvinkita, ke nia spirito estas aĵo de tute nedetrubla naturo; ĝi estas daŭre io efikanta de eterneco al eterneco; ĝi estas simila al la suno, kiu nur por niaj terecaj okuloj ŝajnas malleviĝi, vere neniam malleviĝas, sed senĉese lumadas. Certe ĉio en la naturo estas ŝanĝiĝo, sed malantaŭ la ŝanĝiĝo ripozas io eterna.

La povo nobligi ĉion animalan kaj viviĝi ankaŭ la plej malvivan materion per la edzigo kun la ideo, estas la plej bela garantio de nia neanimala origino. La homo, kiom ajn la vero lin altiras per siaj mil kaj centmil aperaĵoj, tamen levas la rigardon esplorante kaj sopirante al la ĉielo volviĝanta super li en nemezureblaj spacoj, ĉar li sentas en si profunde kaj klare, ke li estas burĝo de tiu spirita regno, al kiu kredi ni povas nek rifuzi nek ĉesi.

Ĉu vi pensas, ke ĉerko povus imponi al mi? Neniu brava homo lasas rabi el sia brusto la kredon je nemorteco!

La konvinko de nia pludaŭro rezultas al mi precipe ankaŭ el la ideo de la agado; ĉar, se mi sentripeze laboros ĝis la fino de mia vivo, la naturo havas la devon prezenti al mi alian formon de la ekzistado, se la nuna ne plu povas enteni mian animon.

La persona pludaŭro nepre ne kontraŭstaros al miaj multjaraj observoj, kiujn mi faris pri la eco de ni kaj de ĉiuj estaĵoj en la naturo; male, ĝi eĉ rezultas el ili kun nova pruvoforto. Kiom aŭ kiom malmulte de tiu ĉi persono cetere estus inda, ke ĝi pludaŭru, tio estas alia problemo kaj afero, kiun ni devas lasi al Dio. Provizore mi nur volas diri unue tion: mi supozas diferencajn klasojn kaj rangojn de la lastaj praelementoj de ĉiuj estaĵoj, kvazaŭ de komencpunkto de ĉiuj naturfenomenoj, kiujn mi volas nomi animoj, tial, ĉar de ili eliras la animiteco de la tuto, aŭ ankoraŭ pli bone Monadoj, ni akceptu tiun ĉi esprimon de *Leibniz*: por esprimi la simplecon de la plej simpla estaĵo oni ne povas eltrovi pli bonan. Nu kelkaj el tiuj ĉi monadoj, kiel montras al ni la sperto, estas tiom malgrandaj, tiom bagatelaj, ke ili ne taŭgas por pli ol nur subalternaj servoj kaj ekzisto; aliaj kontraŭe estas tre fortaj kaj potencaj. La lastaj tial havas la kutimon, ĉion, kio alproksimiĝas, altiregi en sian cirkon, transformi en ion, al si apartenantan, tio estas en korpon, en planton, en beston,

aŭ, ankoraŭ pli alton en stelon. Ili tion daŭrigas tiel longtempe, ĝis kiam la malgranda aŭ granda mondo, kies celo estas en ili spirite, ankaŭ korpe ekaperas ekstere.

Pro tio nur la lastajn mi volas nomi animoj. El tio sekvas, ke ekzistas mondmonadoj, mondanimoj same kiel formikmonadoj, formikanimoj, kaj ke ili ambaŭ estas laŭ iliaj devenoj, se ne tute la samaj, tamen praparencaj. Ĉiu suno, ĉiu planedo enhavas pli altan celon, pli altan destinon, sekve de kiu ĝiaj evolucioj devas efektiviĝi nepre tiel regule kaj samleĝe, kiel la evolucio de rozujo per folio, tigo kaj koloro. . . la larvoj de la intertempaj statoj ne devas erarigi nin.

Estas ĉiam la sama metamorfozo aŭ transformiĝkapableco de la naturo, kiu elkondukas el la ovo raŭpon kaj el la raŭpo papilion.

Cetere la pli malaltaj monadoj obeas al pli alta, ĉar ili devas obei, sed ne tial, ke tio estus por ili ia aparta plezuro. Tio ja ankaŭ farigaŭs entute nature.

Ni rigardu ekzemple ĉitiun manon. Ĝi enhavas partojn, kiuj estas ĉiumomente servemaj al la ĉefmonado, sciinta ligi ilin al si nedisigeble, tuj dum ilia ekesto. Mi povas ludi per ili ĉitiun komponaĵon; mi povas ĉirkaŭflugigi miajn fingrojn laŭplaĉe sur piana klavaro. Ili ja alportas al mi plezuron spirite belan; sed ili mem estas surdaj, nur la ĉefmonado aŭdas. Mi do povas supozi, ke mia mano aŭ miaj fingroj malmulte aŭ nenial havas intereson je mia pianludo. Kiom multe pli bone status ilia sentplezuro, se ili povus flugi kiel diligentaj abeloj super la herbejoj, sidu sur arbo aŭ sin amuzi sur ties florbranĉetoj. La momento de la morto, bone ankaŭ nomata disiĝo, estas la samtempa, en kiu la reganta ĉefmonado eksigas siajn ĝistiamajn servintojn el ilia fidela servo.

Kiel la farigaŭs, tiel mi rigardas la disiĝon sendependa ago de tiu ĉefmonado, kies vera esenco estas tute nekonata de ni. Sed ĉiuj monadoj estas tiel nedetruiblaj, ke ĉe disiĝo ili ne finas aŭ perdas sian agadon, sed ree daŭrigas ĝin en la sama momento. Tiamaniere ili nur eliras el la ĝistiamaj interrilatoj por tuj eniri novajn. Ĉe tiu ŝanĝo decide estas, kiom forta en tiu ĉi aŭ tiu monado estas la intenco. La monado de klera homanimo kaj aliaflanke tiu de kastoro, de birdo aŭ fiŝo, tio estas grandega diferenco. Jen ni ree staras antaŭ la rangklaso de la animoj, kiujn ni devas hipotezi kiam ni volas eĉ nur iom klarigi al ni la aperaĵojn de la naturo. Ĉe iu surtera morto ĉiu monado iras tien, kien ĝi apartenas: al la akvo, aero, tero, fajro, al la steloj; jes: la mistera tiro, kiu ĝin kondukas tien, enhavas ankaŭ la misteron de ĝia estonta tasko.

Kie la scio sufiĉas, ni ne bezonas la kredon, sed kie la scio sian forton nepruvas, aŭ ŝajnigas nesufiĉa, ni ankaŭ ne disputu kontraŭ la rajto de la kredo. Se oni nur deiras de la principo, ke scio kaj kredo ne ekzistas por nuligi sed por kompletigi unu la alian, la ĝusto certe ĉie estos trovata.

Mi neniel volus nehavi la feliĉon kredi estontan pludaŭron, eĉ mi

volus diri kun *Lorenzo de Medeci*, ke ĉiuj ankaŭ dum tiu ĉi vivo estas mortintaj, kiuj ne esperas alian; tamen tiaj nekomprenblaj aferoj estas tro altaj, por esti objekto de ĉiutaga reflektado kaj persono detruanta konjektado. Krome: kiu kredas pludaŭron, tiu estu silente feliĉa, sed li ne havas kaŭzon fieri pri tio. Tamen okaze de la *Tiedge*'a »Urania« mi rimarkis, ke same kiel la nobelaro tiel ankaŭ la piularo formas kvazaŭan aristokrataron. Mi renkontis malsaĝajn virinojn, kiuj estis fieraj, ĉar ili kredis kun *Tiedge* senmortecon, kaj mi devis toleri, ke pri tiu ĉi punkto kelkaj min ekzamenis tre malmode; sed mi ilin koloretigis dirante: »Estus tute ĝoje, se post fino de tiu ĉi vivo feliĉigus nin dua vivo; sed mi petus por mi, ke transe min ne renkontu iu el tiuj, kiuj tie ĉi estis kredintaj tion. Ĉar tiam la turmento nia vere komenĉiĝos. La piuloj ĉirkaŭus min kaj dirus: »Ĉu ni estis pravaj? Ĉu ni ne tion profetis? Ĉu ne ĉio okazis? Kaj per tio ankaŭ transe la enuo ne finiĝos.«

La sinokupo pri senmortecideoj taŭgas por altrangaj klasoj kaj precipe por inoj ne havantaj laboron. Sed brava homo, klopodante jam tie ĉi, esti vera taŭgulo, tial ĉiutage celas, batalas kaj efikas, ne parolas pri la estonta mondo; li agas kaj estas utila en tiu ĉi mondo.

Plue ideoj pri senmorteco estas por tiaj, kiuj ĉi tie ne estas favoritoj de la feliĉo, kaj mi vetus, se la bona *Tiedge* havus pli bonan sorton, li havus ankaŭ pli bonajn pensojn.

La homoj troe moralkritikas unu la alian, fipastroj kaj fiinstruistoj turmentas senfine. La saĝulo kontraŭe diras: »Ĵugu neniu, ĝis kiam vi estus starinta sur ties loko. Ĉu vi esploris la internajn cirkonstancojn de lia agado? Ĉu vi scias disvolvi kun certeco la kaŭzojn, kial ĝi okazis, kial ĝi devis okazi? Se vi estus farintaj tion, vi ne tiel rapide juĝus.« En la mondo estas ne malfacile rimarkeble, ke la homo sin sentas plej libera kaj perfekte senigita je sia mankaro, kiam li prezentas al si la mankojn de aliaj kaj mallaŭdadas ilin kontente.

En mia kvardeka jaro mi estis pri kelkaj aferoj tute tiel klara kaj saĝa kiel nun kaj en kelkaj rilatoj eĉ pli bona. Kaj se en la junaĝo oni ne farus petolojn kaj kelkfoje forportus dorson batitan, kiun temon por pritrakti oni do havus en la maljunaĝo. Ekzemple nun mia bofilino volas entrepreni malsaĝe vojaĝon pro nenio! sed tia nenio ofte por la junuloj estas senfina multo; kaj entuto kiom ĝi valoras? Oni devas ofte entrepreni ion frenezan nur por povi vivi pluan tempon. Mi ne agis pli bone en mia junaĝo kaj tamen mi eliris ankoraŭ kun sufiĉe sana haŭto.

Konfido kaj sindono estas la veraj fundamentoj de ĉiu bona religio kaj same sinsubmeto sub volo pli alta, la okazaĵojn ordiganta, kiun ni ne komprenas, ĉar ĝi ja estas pli alta ol nia racio kaj prudento.

En tiu ĉi mondo oni vane klopodas laŭ propra volo. Kion mi dezirus firmteni tion mi devas lasi, kaj bonfaro nemeritita altrudiĝas al mi.

Mi volas nek esperi nek timi kiel ordinara banalulo. Kiel nia

fizika tiel ankaŭ sociala vivo, moroj, kutimoj, mondumilerteco, filozofio, religio, jes, eĉ kelka hazarda okazaĵo: ĉio vokas al ni, ke ni rezignu. Tamen nur malmultaj homoj ekzistas, kiuj entute rezignas unufoje por ĉiam, por eviti ĉiujn partajn rezignojn. Ili konvinkigas pri la eterno, neceso, naturleĝo kaj klopodas perlabori al si tiajn ideojn, kiaj estas nedetruiblaj, eĉ ne estas neniigataj per observado, sed kontraŭe estas certigataj; sed ĉar tio efektive enhavas ion superhoman, ordinare tiaj personoj estas rigardataj kiel nehomoj sen dio kaj ekster la mondo; oni eĉ ne scias, kiajn kornojn kaj ungegojn oni almetu al ili: La afero de nia vivo havas misteran iron, ne kalkuleblan. La individuo povas certigi sian parencecon kun la dieco nur per tio, ke li sin subigas kaj adoras.

Tiu estas malsaĝulo, kiu ne povas miri, kiun ne impresas profunde la eternaj naturleĝoj en grandaj kaj malgrandaj objektoj — tute egale, kiom grandaj aŭ malgrandaj. La plej alta, kiun homo povas atingi, estas la miro. Ni ja ekkonas, ke ĉiuj homoj, nepre naturforte ekipitaj tiel laŭ intelekto kiel laŭ korpo, ĝenerale estas la plej modestaj; kontraŭe: ĉiuj precipe laŭ spirito malpli perfektaj estas multe pli ofte arogantaj. Ŝajnas, ke la bona naturo al ĉiuj, kiuj estas malprofitigitaj de ĝi laŭ pli alta rilato, donis la pretendon kaj la ridindan fieron kiel egaligantan kompenson kaj komplementon.

Ĉe stultuloj kaj spirite malklaruloj troviĝas pretendo, ĉe spirite klaruloj kaj alttalentuloj ĝi troviĝas neniam. Ĉe tiaj troviĝas ne pli ol ĝoja sento de ilia forto.

Ĉiuj leĝoj kaj moralaj reguloj povas esti reduktataj al unu, la vero. Mankojn de la individueco la morala mondordo koncedas kaj indulgas al ĉiu; pri tio ĉiu traktu kun si mem, kaj ĉiu ankaŭ sin mem punos pro tio. Tamen kiam oni transpaŝas la limojn de la individueco, — krime konfuzante, nevere, — tiam la nemesiso frue aŭ malfrue aljuĝas la konvenan punon eksteran. La homo turnu sin kien ajn, li entreprenu kion ajn, ĉiam li revenos sur tian vojon, kiun unufoje trudis al li la naturo. Serĉante sian pli altan destinon, aŭ sur tero aŭ en ĉielo, ĉu en estanta ĉu en estonta tempo, tamen li restas elmetata interne al ĉiama ŝancelado, de ekstere al influo ĉiam ĝenanta, ĝis kiam li decidas sin unu-por-ĉiufoje deklari, ke la ĝusto estas tio, kio konvenas al li. Pri mi oni vere neniam estis kontenta kaj oni deziris min ĉiam alia, ol Dio bonvolis min fari. Laŭdante min oni volis, ke mi ne akceptu tion en ĝoja memfido kiel ŝuldatan tributon, sed oni atendis de mi iun rifuzantan modestan frazon, per kiu mi humile klarigus la tutan senvaloron de mia persono kaj de mia verko. Tamen tio kontraŭstaris mian naturon, kaj mi devus esti mizera kanajlo, se mi volus tiel hipokriti kaj mensogi. Kontraŭe sufiĉe forta por prezenti min en tuta vereco tiel, kiel mi sentis, mi estis kaj estas ankoraŭ ĝis la hodiaŭa tago rigardata kiel fiera. En religiaj, en sciencaj kaj politikaj aferoj, ĉie malhelpis min, ke mi ne hipokritis kaj ke mi havis la kuraĝon diri, kion mi sentis. Kie hodiaŭ originala

naturu renkontas nin nekaŝata? kaj kie iu havas la forton, esti vera kaj sin montri, kia li estas?

Per kio la morala bono venis en la mondon? Per Dio mem, kiel ĉia alia bono. Ĝi ne estas pli aŭ malpli enkreita al ĉiuj homoj, sed algrade al unuopaj animoj precipe naturdonitaj. Tiuj ĉi aperigis per grandaj faroj aŭ instruoj sian dian internon, kiu poste ekkaptis la amon de la homaro per la beleco de sia apero kaj fortiregis al adoro kaj imito.

Nun la valoro de la morala belo kaj bono povis esti ekkonata per sperto kaj saĝo, ĉar la malbona sin dokumentas per siaj konsekvencoj tia, kiu detruas la feliĉon de la individuo same kiel de la homaro; kontraŭe la noblo kaj ĝusto sin dokumentis tia, kiu alportas la individuan kaj homan feliĉon. Tiamaniere la morala belo povis fariĝi objekto de la instruoj kaj disvastiĝi per vortoj super tutaj popoloj.

Nur ĉiutaga resumado pri faro kaj travivo efikas, ke oni ĝoje ekkonas sian faradon; ĝi kondukas al akurateco. Mankoj kaj eraroj aperas senpere per tia ĉiutaga librotenado, la heligo de la estintaĵoj utilas por la estonto. Homoj, kiuj estas mondanaj dum la tuta jaro, kredas, ke ili devas fariĝi religianaj dum la tempo de la mizero; ili rigardas ĉian bonon kaj moralon kiel medikamenton, kiun oni glutas kontraŭvole kiam oni malbonfartas. Ili rigardas pastron aŭ moralinstruiston nur kiel kuraciston, kiun oni plejeble rapide elpelas el la domo; sed mi volonte konfesas, ke mi rigardas la moralon kiel dieton, kiu estas dieto, nur se mi ĝin igas vivregulo, ne malatentante ĝin dum la tuta jaro.

Pensi kaj agi, agi kaj pensi, tio estas la sumo de ĉiu saĝeco. Ambaŭ devas moviĝi interne en la vivo tien kaj reen kiel en- kaj el-spiro. Kiu elektas por si kiel leĝon, ekzameni la agon per la penso kaj la penson per la ago, tiu ne povas erari, kaj se li eraras, li baldaŭ trovas la ĝustan vojon. Certe nur viraj, kapablaj spiritoj estas altigataj kaj fortigataj per ekkono de sia eraro. Tia ektrovo levas ilin super ilin mem; ili estas altigataj super sin mem, ili ĉirkaŭrigardas, ĉar la malnova vojo estas barita, rapide al iu nova vojo, por iri ĝin freŝe kaj kuraĝe.

Savita estas la nobla membro
de l'sprita mondo el la malbono:
kiu ĉiam altencelante klopodas,
tiun ni povas savi,
kaj se eĉ la amo pri li
de supre interesis,
akceptas lin beata oro
kun kora bonvensaluto.

Tiuj versoj entenas la ŝlosilon por kompreno de la savo de *Faust*: jen en *Faust* mem agemo ĉiam pli alta kaj pli pura ĝis la fino; jen supre la helpvenonta eterna amo al li.

Tio nepre harmonias kun nia religia ideo, laŭ kiu ni ne nur farigas beataj per nia propra forto, sed per la alvenanta dia favoro.

Mi ĉiam kredis al Dio kaj al la naturo kaj al la venko de la bono super la malbono, sed tio ne sufiĉis al la piaj animoj: mi devis ankaŭ kredi, ke tri estas unu kaj unu tri; sed tio kontraŭstaris mian verecan senton de mia animo; ankaŭ mi ne komprenis, ke tio nur plej malmulte helpus min.

Tradukis la Vendreda Klubo de LEIPZIG.

ANTAŬ SUNLEVIĜO, EN LA VALO DE CHAMOUNI.

DE S. T. COLERIDGE (1773—1834).

Ĉu sorĉas vi la stelon de l'maten'
 por, detenante lin de l'kruta voj'
 ĉe l'supre lin restigi, Reĝo Blanc?
 Arve kaj Arveiron ĉe la malsupraĵ'
 senĉese furiozas; vi, timiga form',
 vin levas el silenta pinomar'
 kiel silente! Super, apud vi
 l'aer' profunda estas kaj sen lum' —
 ebona maso: ŝajne vi per kojn'
 traboras ĝin; sed ririgardas mi:
 ĝi estas via templo el kristal'
 kaj hejm' kvieta de la eternec'.
 Terura kaj silenta Monto! vin
 rigardas mi ĝis vi, de l'korpa vid'
 ĉiam sentata, iris el la pens':
 kaj, altigite per fervora preĝ',
 adoris nur la Nevidaton mi

Vi tamen, kiel rava melodi',
 tia, ke senkonscie aŭdas ni,
 dume kunigis vin kun miaj pens'
 kaj viv' kaj ties plej kaŝita ĝoj',
 ĝis mem l'animo, vastiĝinte pli,
 ravite, fluiĝinte en ekstaz',
 forpasis al la vizi plena glori,
 kaj tie, kiel en la propra form',
 ŝvele ĝi etendiĝis al Ĉiel',

Vekiĝu, ho, anim', ĉar via ŝuld'
 ne estas nur sekreta ekstazi',
 ŝvelantaj larmoj kaj silenta dank'!
 Vekiĝu, voĉ' de dolĉa kanto! Vi
 vekigu, mia kor'! Glacikrutaĵ'
 kaj verda valo, himnu vi kun mi!

Unue vi, de l'val' la sola reĝ',
 luktanto kontraŭ nokta mallumec',
 de ĉiu stel' tra l'nokt' la gastigant'
 ĉu supren aŭ malsupren grimpas ĝi:
 kunulo de l'matena stelo, vi,
 la rozkolora stelo mem de l'ter',
 kaj kunheroldo de la mateniĝ', —
 vekigu kaj laŭdpsalmon kantu vi!
 Kiu abisme for de l'sunobril'
 kolonojn bazis en la ter' por vi?
 Kies donac' la rozkolora frunt'?
 Kiu rivernaskanton igis vin?

Torentoj kvin, sovaĝaj en la ĝoj',
 kiu vin vokis for de l'nokt' kaj mort',
 for de l'malluma glacikavernar',
 tra nigra, kruta, roka dentpintar'
 ĉiam fendita kvankam sen ŝanĝiĝ'?
 Kies donac' la nevundebla viv',
 la ĝojo via kun la furiec',
 la rapideco ankaŭ, kaj la fort',
 senĉesa fulmo kaj eterna ŝaŭm'?
 Kiu ordonis — (tuja la silent'),
 »Ripozu, rigidiĝu vi, ondar'»?

Vi glacifaloj! kiuj de l'altaj'
 tra mondfendegoj forte klinas vin —
 torentoj, kiuj aŭdis, kredas mi,
 potencan voĉon, kaj ekhaltis tuj
 meze de l'plej tumulta subenir'!
 sennovaj torentegoj de l'silent'!
 kiu vin faris gloraj kiel pord'

ĉiela sub la hela lun'; — al sun',
 ke li per ĉielarkoj vestu vin,
 ordonis? Kiu glorkolore vin
 girlandis per la floroj ĉe l'pied'?
 »Dio!» simile al homarkrieg'
 torentoj ekrespondu, kaj la voĉ'
 de l'glaciebenaĵoj sonu, »Di'!»
 »Dio», — riveroj gloru vi, — kaj vi,
 pinaroj, kun anima, milda son'! —
 ankaŭ neĝmasoj voĉon havas, jen,
 kaj en faleg' terura tondros, »Di'!»

Floroj vivantaj ĉe l'eterna frost'
 kaproj ludantaj ĉe la aglonest'
 vi agloj' kunludantoj de l'venteg'
 vi fulmoj, minacsagoj de l'nubar'
 vi signoj kaj mirakloj de l'natur'
 eldiru, »Dio!» kun resona voĉ', —
 plenigu vi la montojn per ador'!

Ho, vi, antikva ĉielmontra Blanc,
 de kies baz' tra l'pura serenaj'
 glitiras, neaŭdate, jen, lavang'
 en fundon de la brusta nubvual' —
 vi, ankaŭ vi, grandega Monto, vi! —
 (Mallonge mi kun riverencmien'
 en adorado staris; sed jam nun,
 levinte mian kapon, kun rigard'
 supreniranta grade de la baz'
 ĝis supro, mi vin vidas per okul'
 duone blinda ja pro larmvual' —
 kvazaŭ nebul', solene ŝajnas vi
 leviĝi) — ho, leviĝu tra l'eon',
 kiel incens' leviĝu vi de l'ter'
 Spirit' entronigita en montar',
 Ambasador' de Tero al Ĉiel',
 eldiru, sankta Estro, al ĉiel'
 al steloj kaj la leviĝanta sun':
 Dion milvoĉe ĉiam laŭdas Ter'!

El la angla lingvo tradukis A. J. ASPLEY kaj A. L. CURRY. (Aŭg., 1912)

TRI LIRIKOJ DE WILLIAM SHAKESPEARE

(1564—1616).

Madrigalo. (El *Measure for Measure*, Ak. 4, Sc. 1).

Tiuj lipoj estu for! —
 dolĉaj per malver-venen'
 kaj l'okuloj, matenglor'! —
 falsa lum' de l'tagalven':
 sed revenu kis' de l'am',
 kis' de l'am', —
 amsigelo vana jam,
 vana jam!

* * *

Fidele. (El *Cymbeline*, Ak. 4, Sc. 2).

Sunon ne plu timu vi,
 nek la vintron voĉsonoran;
 hejmen iru kun premi',
 elfarinte mondlaboron:
 al junuloj venas mort',
 ĉu oro aŭ mizer' la sort'.

Timu ne pro reĝkoler',
 vane batas nun tiran';
 pensu ne pri viv' sur ter';
 al kverk' egalas nun la kan':
 alvenas viro kaj virin',
 klerul' kaj reĝ' al tiu fin'.

Fulmon ne ektimu vi,
 nek falon de la tondroŝton';
 vin ne tuŝas kalumni';
 jam forestas ĝoj', bezon':
 amantojn frapas la l'destin', —
 al ĉiu hom' jen sama fin'.

Sorĉisto vin ne ĝenu!
 nek desorĉist' ĉagrenu!
 fantomoj vin forlasu!
 malbono preterpasu,
 restadu en honor'
 ĝis sonos lasta hor'!

* * *

Carpe diem. (El *Twelfth Night*, Ak. 2, Sc. 3).

Ho, kien, Karulin', vaganta?
 ho, restu por la ameganto;
 ĉarmos li per kantoj mil:
 haltu, dolĉa belulino;
 l'amo estas vagofino,
 scias ĉiu saĝa fil'.

Kio l'am'? ja ne estonta!
 nuna rid' kun ĝoj' estanta!
 sin ne montras l'estontec':
 en prokrast' jen vedestino;
 min do kisu, dolĉulino!
 frue pasas for junec'.

El la angla lingvo tradukis A. J. ASHLEY.

BIBLIOGRAFIO.

Noto: L. E. R. recenzas librojn, k. c., kondiĉè, ke oni donace alsendas du ekzemplerojn.

(A) INTERNACILINGVAJ VERKOJ.

MIZERO KAJ SUFEREGO DE LA NURNBERGAJ INFANOJ, eld. la Komitato de NURNBERGA PORINFANA HELPO, oficejo *Losunger am Lauferschlagturm*, 6, Nurnberg. 16.8×23.3 cm.; 24 p.; broŝ.; senpaga.

Jen kortuŝa alvoko, kiu sin bazas sur oficialaj statistikoj kompilitaj de la Urba Konsilantaro de *Nurnberg* rilate al la nutrada, loĝeja, kaj vestada problemoj, la naskiĝ- kaj mortciferoj, kaj ĝenerala sanstato de la loĝantaro. Ĝi estas ilustrita per komparaj tabeloj montrantaj la normalbezoon de ĉefaj vivrimedoj — pano, terpomoj, graso, k.t.p. — kaj la posemajnan porcion por unu plenkreskulo dum

jaroj 1906—20. Malkaŝiĝas vere terura aferostato. En 1920 oni disdonis nur 40% el la kvantoj normale bezonataj. Krom nutraro, estas mizeriga manko de vestaĵoj kaj litkovriloj. Kompare al la prezoj de 1913, la plialtiĝo de kosto de necesajoj estas, interalie, ŝuoj 1122% karboj 1150%, sapo 1775%, ĉemiztolo 2400%. La infanoj, nesufiĉe nutrataj, preskaŭ nudaj kaj nelavitaj, ĉiam pli kaj pli grandnombre fariĝas viktimoj de tuberkulozo, raĥitizo, haŭtmal-sanoj, kaj okulbrulumoj.

»*Sen persista fremda helpe ili neeviteble degenerados korpe, anime kaj morale. Miloj da infanoj pereos, pluaj miloj estas en danĝero*

perei, se ne estos helpataj laŭplane kaj rapide.»

Eĉ tiuj, kiuj plej laŭkoscience krias, »Pagigu Germanujon!», ne povas rifuzi la plendon de senkulpaĵaj etuloj, kiuj antaŭ la milito eĉ ne estis naskitaj. La broŝuron devas legi ĉiu, al kiu la termino. »Kristana Esperantismo» estas io pli ol tropo. LOUISE BRIGGS.

* * *

ELEKTITAJ POEMOJ de *Heinrich Heine* tradukitaj el la germana lingvo de *Friedrich Pillath*; eld. de *Esperanto-Verlag Friedrich Ellersiek, Berlin* S. 59; N-o 6 de la Nova Esperanto-Biblioteko; 46 p., 11×15 cm.; prezo, Rmk. 3+80%.

Tiu ĉi libreto, kiu eliĝis en Germanujo antaŭ sep jaroj estas laŭdinda provo prezenti al la Esperantistaro la preskaŭ nekapteblajn dolĉecojn de la temoj kaj poezia elfaro de la fama germana lirikisto. Oni memoras faman fabelon de Esopo, en kiu maljuna virino, elflarinte malplenan vinbarelon, ekdiris. »Ho, rava aromo, — kiel bona sendube estis la iama enhavo se la restaĵo estas tia». Kompreneble la verkisto ne donas al ni nuran feĉon.

SONDISTO.

* * *

RAPORTO DE LA PREZIDANTO DE LA LINGVA KOMITATO KAJ AKADEMIO; eld. en Parizo, 10an. de julio, 1921; 6-paĝa pamfleto, 24×15.6 cm.; subskribita de *Th. Cart*; senpage; adr. Esp. Centra Oficejo, 51, Rue de Clichy.

Salutinte la memoron de Rektoro *Boirac*, sia antaŭulo, Prof. *Cart* resumas la historion de la

Esperantaj Lingvaj Institutioj depost julio, 1914, ĝis la nuna tempo. Sekvas paragrafoj pri la militotempaj kondiĉoj rilate la akademian laboron; la nuna oficistaro de la Akademio; la agado rilate al la diskutado pri landnomoj; la faroj de la Sekcioj por (1) Komuna, (2) Teknika Vortaro; la reorganizo de la Lingvaj Institutioj; kaj la unueco, kiel nepra kondiĉo de la triumfo de Esperanto.

Laŭ nia opinio la organizkonfuzo, kiun la milito okazigis, tute senkulpigis la Akademion pri ĝia longa silento: multaj ne komprenas la agadolimojn, kiujn regulobservo trudis al la Akademio, Tiu observo de la konstituciaj reguloj estis nepre necesa al la Akademio, kiel al ĉiu publika korporacio, kiu akordigas diversajn skolojn, k.c. Al aliaj, kiuj ne havis aŭtoritaton sed pro oportuna situacio povis kapti la orelojn de novaj Esperantistoj, mankis tiu respondeca sintenado: de tio devenis iom da necesaj diskuto kaj konfuzo. Tamen nun la Esperantistaro sin orientas; kaj sendube pli kaj pli malatentos individuojn, gazetojn, k.c., kiuj allogas for de la ĉefa devo de ĉiu Esperantisto, atentado al la gvido de la konstitucie starigitaj Lingvaj Institutioj. — A. J. ASHLEY.

* * *

B. E. S-a ADRESARO 1921 (tria jaro: prezo 1.50 fr. sv., t. e., 1ŝ. 5p.). Broŝuro; eldonita de la Bohema Esperanto Servo, *Moravany*, Ĉeĥoslovakujo; 69 paĝoj, 11.3×14.5 cm.

Ĝi enhavas la adresojn de

Esperantistoj, gazetoj, firmoj, k. c., en la tuta mondo, kaj estos tre utila por internaciaj korespondantoj, kies nomojn la kompilanto volas presigi malkare: sed ŝajnas al ni, ke la Jarlibro de U. E. A. jam pli bone plenumas ĉiun rolon tian. — L. A. L.

* * *

UNUA KAJERO: AŬSTRIA KOLEKTO DE LEGINDAJ RAKONTETOJ, FABLOJ, k. t. p.; Nova Tempo-Libretaro; Eld. de Eldonejo Nova Tempo, *Wien, VI, Mollardgasse* Nr. 55, Aŭstrujo; 1921; 32 p., 12×18.6 cm.; prezo, Fr. sv. 0.30.

Ĉi tiu libreto konsistas el dek kvin fabloj, k. c., tradukitaj el diversaj lingvoj; kaj ĝi formas sufiĉe interesan legmaterialon. — LEGISTO.

* * *

MISERERE KAJ THAIS; du tradukaĵoj de *Edward S. Payson*, Prezidinto de la Esp. Asocio de Norda Ameriko, 66 p. 12½×17½ cm.; prezo, 50 cendoj.

* * *

MISERERE. En tiu ĉi historieto la fame konata verkistino, *Mabel Wagnalls*, laŭ sia kutima lerteco rakontas tre dramece la morton per duelo de juna itala leŭtenanto kaj ĝiajn rezultojn fatalajn por lia fratino, mirinda kantistino, kaj ŝia fianĉo. Tiu ĉi triobla tragedio, kunmetita el malmulte da okazaĵoj, konstante tenas la atenton de la leganto, kaj allogas per sia pura kortuŝanta ĉarmo. Oni devas tamen konfesi, ke iom difektas ties efikon la malklimakso de la lasta ĉapitro.

THAIS estas resumo esperant-

igita el angla traduko de la romaneto de *Anatole France*. Ĝi prezentas vivsimilan bildon de vivo en la luksa, idoloserva urbo Aleksandrio, tempe de la praaj kristanoj. *Thais*, fame konata, belega amaĵistino, kristaniĝas per influo de sia antaŭa konatulo, *Paphnutius*, kiu, estante idolano, avide serĉis la feliĉecon kaj fine trovis ĝin en monaĥejo. La rakonto estas plena je frapantaj, vivece pentritaj scenoj; sed la centra okazaĵo, la konvertiĝo de *Thais*, ŝajnas iom nekonvinka, kvazaŭ ŝi kristaniĝis pro ne tre urĝa kaŭzo kaj sen entuziasmo. Eble tio rezultas el la fakto, ke ni ne havas la plenan verkon.

De ambaŭ romanetoj la traduko estas tre bone farita, kaj fluas laŭ tiel simpla, bela stilo, ke, legante ĝin, oni malfacile memoras, ke tio ne estas originala verko.

Oni rimarkas kelkajn neordinarajn frazojn, ekz., »spite de mia atentado» anstataŭ »spite mia atentado»; »escepte la kantistinon», kaj »escepte de unu fakto», anstataŭ »esceptinte» kun akuz., aŭ pli simple »krom».

Sur p. 15 »strangeco» evidente devas esti »strangaĵo. Tamen tiaj difektetoj estas tre malmultaj, kaj tiu ĉi libreto estas konfide rekomendinda al ĉiuj Esperantistoj, ĉu spertuloj ĉu lernantoj. — E. O. E. L.

* * *

LA PESTO EN MILANO DUM 1630, el »La Gefianĉoj» de A. *Manzoni*; ĉap. 31 k. 32 trad. de D-ro P. C. *Monti*; eld. de A. *Paolet*, S. *Vito al Tagliamento*, Italujo, 1921

broŝ. 21 p. 17×24 cm.; Kolekto de la revuo »L'Esperanto».

Bedaŭrinde iom malfacila stilo kaj diversaj dubindaj frazeroj difektas la supre nomitan libreton: tro ofta uzo de la prepozicio »je», kiun oni renkontas ĉe p. 1, ekz., kvarfoje en du linioj; »dume dum»; »bruligi kiel ensorĉistino malfeliĉulinon» anstataŭ »bruligi feliĉulinon kiel ensorĉistinon»; »ĉiesaj buŝoj»; k. c. Tre malmultaj verkistoj povas tute eviti erarojn, kaj periodo de la Esperanta literaturo penadi por verki en gramatika kaj facila stilo estas ĉies respondeco.

La du ĉapitroj prezentas historie valoran bildon de la terura pestotempo, kaj ili indas traduklaboron. Eŝceptante la stildifektojn supre cititajn, ni rekomendas la broŝuron. — H. I.

* * *

TRA LA MONDO: Internacia Legolibro; red. *Paul Bennemann*; 1a. Parto: por komencantoj; eld. *F. Hirt* kaj *Filo*, Leipzig, 1921; 96 p., 17.7×22.2 cm., kun forta kovrilo; ilustrita; prezo, 10 Rmk. + sendkostoj.

Ni kore gratulas la redaktoron kaj la eldoniston pri ĉi tiu tute rekomendinda legolibro. Ĝi estas bonaspekta, malmultekosta libro, kiu per diverseco de enhavo (proverboj, aforismoj, sentencoj, fabeloj, fabeloj, rakontoj, interesaĵoj el la vivo kaj sciencoj, ŝercaĵoj, amuzaĵoj, kantoj kun notoj) certe kaptos la atenton de lernanto. La ilustraĵoj estas artaj kaj plifortigas la ĝeneralan allogenon de ĉi tiu bonega produktajo. — LEGISTO.

KRONIKO DE LA EKLEZIA ESPERANTISTA LIGO.

(A) ĜENERALA.



NOVAJ LIGANOJ. Ni havas la plezuron bonvenigi ĉi tiujn novajn liganojn: M. Cerise Deane (*Cahir, Tipperary*); John

Albert Douglas, B. T., Presb., Paroĥestro de *Camberwell* (Londono); Tom Llewellyn Gomersall, M. A., Presb., Org. Sek. de la Hejmoj de D-ro Barnardo (*Tadcaster*); H. W. Hamilton (*Dewsbury*); Konstanteno Markelloviĉ Kolobaŝkin, Presb., Paroĥestro de *selo Lomigori*; Wil-

liam Marshall Teape, M. A., Presb., Paroĥestro de *South Hylton*.

NUNA PROPAGANDO. Portempe la Ligo flanken metis la pli ĝeneralan propagandon por kiel eble plej multe eviti elspezon dum kriza tempo financa; kaj pro la sama kaŭzo ni ĉesis diversajn specialajn laborojn. La financa malfacilaĵo, kiu tute devenas de malfavoraj komercaj kondiĉoj, la terura konfuzo kiu regas en la internacia monsisistemo, k. c., certe forpasos se nia agado dum unu-du jaroj estas monŝparema.

Intertempe ni plifortigas la Ligon per persona alpeto al gravaj individuoj; kaj ni ĝojas, ke tiu laboro jam alportis iom da rezulto: tion konstatas la supredonita listo, kiu enhavas la nomon de presbitero, kiu estas ĉefulo en la reunuiga laborado, precipe rilate la sintenado de la Anglikana Eklezio al la Orienta-Ortodoksa; ankaŭ troviĝas la nomo de unu el la protagonistoj en la enkonduko de Esperanto en la last-nomitan Eklezion. Se Membroj kaj Asocioj daŭrigos la subtenon, nia laboro certe havos sukceson. La lingvo tre multe progresis lastatempe en diversaj tre gravaj fakoj: ni ne povas dubi pri eventuala venko ĉar de nun ni povas diri, ke Esperanton rekomendas la Franca Akademio, la Brita Asocio por la Akcelado de la Scienco, la Internacia Asocio Ruĝkruca, la Komerca Ĉambro de Paris, la Unuiĝo de Internaciaj Asocioj, k. c., kaj de la Ligo de Nacioj pli kaj pli favorigas.

NIA 8A ĈIUJARA ĜENERALA KUNVENO okazos en Londono la 22an. de Nov. en la Legoĉambro de la B. E. A. (17 Hart-Street, W. C. 1).

LA FINANCA STATO DE LA LIGO.

La konto de 1920—21 montris iom grandan deficiton, sed ĝi estos malpli ol tio de la lastajaro; fakte ĝi konsistis el la deficiton de tiu jaro transskribita en la konton de ĉi tiu jaro post granda peno por malpliigi ĝin. Ni rememorigas ĉiun Liganon, ke la Liga Jaro komenciĝas la 1an. de Nov.; kaj ni petas, ke ĉiu pagu la kotizaĵon (3ŝ. aŭ 5ŝ) kiel eble plej frue. Ĉiu konsideru, ke la kotizaĵoj tute ne sufiĉas por pagi la elspezojn de la Ligo kaj ke pro tio estas nepre necese ankaŭ sendi donacon se eble.

† NEKROLOGO: *John Wilson.*

Per la morto de John Wilson el Leek (Anglujo) la Ligo perdis tre grandaniman kaj sindoneman kunlaboranton. Li aliĝis la 14-an. de Aprilo, 1917, kaj depost tiu dato konstante helpis nin, ĉefe per traduka laboro. Krom tio lia bonkoreco kaj simpatia sintenado estis tre ofte granda spirita fortigo en cirkonstancoj, kiuj kelkfoje naskis malesperon. Lia foriro estas vere persona perdo al la Sekretario. Ni kondolencas S-inon Wilson kaj ŝian familion en ĉi tiu granda malĝojo. — *Hon. Sek. de la E. E. L.*

Por la propagandisto, studento de Angla lingvo aŭ Esperanto,
kaj aŭtoro de etimologiaj kart-ludoj.

Angla kaj Esperanta Etimologio

ENGLISH AND ESPERANTO ETYMOLOGY

CHARLES G. STUART-MENTETH, B. A. GNON.

„Classes of words, English and Esperanto, so arranged and printed as to bring out the roots in them“.

„Specoj de vortoj en Angla lingvo kaj Esperanto tiamaniere aranĝitaj kaj presitaj, ke elmontriĝis la radikoj en ili“ (traduko). — *Amerika Esperantisto*.

„Utila lernilo por atentigi la anglan publikon pri la multaj Esperantaj radikoj en ilia lingvo“. — *Holanda Pioniro*.

„Por encerbigi la Esperant-radikojn tiu ĉi verketo por anglolingvanoj tre taŭgas“. — *Svisa Espero*.

10 pencoj: 4 respond-kuponoj.

B. E. A., 17 HART STREET, LONDON, W. C. 1

ESTAS LA DEVO
DE
ĈIU BRITA ESPERANTISTO

helpi al

**LA BRITA
ESPERANTO-ASOCIO**

Kaj tiel fortiĝi la Movadon en la
Brita Imperio

Prospekto senpage ĉe la B. E. A.

Adreso: LA SEKRETARIO DE LA BRITA
ESPERANTO-ASOCIO 17 HART STREET,
LONDON, W. C. 1

Antaŭ la amasmovado al Esperanto
aĉetu la historiaĵojn!

Eparhia Muziko por Vulgara Kantado
redaktita de **ROYLE SHORE**.

Prezo: Sm. 0.14 N.o. 3. (3¹/₂ pencoj) afr.

Antikva Kantado Ebena
(CANTUS PLANUS)

por la **Sankta Komunio**, (kiel uzita en
Birmingham, 1920).

Notoj por kanto de Kyrie Eleison, Gloria,
Credo, Sanctus, Benedictus, Agnus Dei, Pater
Noster kaj la Gloria in excelsis.

Eldonita de la Eklezia Esperantista
Ligo, aĉetebla ĉe Pastro A. J. Ashley,
Farnley Tyas, Vicarage, Huddersfield,
Anglujo.

Tiu, kiu reklamas en la internacia lingvo, konatiĝas tra la tuta mondo.

DENTEX

Purigajo por artaj dentoj
Rapide purigas falsdentariojn kaj
similnovigas ilin

Ĝi pereigas mikrobojn tuj kaj donas
senton de plezuriga pureco

1/- PER LADSKATOLO

Poŝtelspezo aldone

**Angle, 3 d. (125 spesoj)
Fremdlande, 6 d. (250 spesoj)**

W. MINCHIN, Farmaciisto
15 WESTGATE, GLOUCESTER

**ALFARITAĴO de la
STENOGRAFIO de PITMAN
al ESPERANTO**

(Afrankite, 1 ŝ. 1 p., Sm. 0.55)

de A. W. LYNDRIDGE
F.I.P.S., F.B.E.A.

ĈIU ESPERANTISTO

DEVAS UZI

La ESPERANTO FONTPLUMON

7 ŝ. d., Sm. 3.75

DE

**La Estro: Business Training College
and Typewriting Copying Office**

**WESTON ROAD
SOUTHEND-ON-SEA, ANGLUJO**

TREZORO de la Monliteraturo.



LA LIBRO
DE
KOMUNA PREĜO.

(Esperanta Tradukaĵo de la Anglikana Preĝlibro uzita
depost la 16a Jarcento)

KAJERA ELDONO

Kajeroj 1 kaj 2 estas haveblaj.

Prezo: Sm. 0.333 (8 pensoj); Sm. 0.354 (8½ p) per poŝto.

ABONPREZO:

KAJEROJ 1-5: S 1.75 afr. (3ŝ. 6p.)

Kredeble oni kompletigos la Libron en ok
Kajeroj.

LA EKLEZIA ESPERANTISTA LIGO.

Hon. Sek.: Pastro A. J. ASHLEY

FARNLEY TYAS.

HUDDERSFIELD.

ANGLOLANDO.